
ISSN 0984 7626

# evangeliaj kajeroj

## LA SPIRITA VIVO



ne mi mem
sed
Kristo vivas
en mi

3
1988

EVANGELIAJ KAJEROJ

*internacia revuo en Esperanto*

----------

*listo de la planataj sekvantaj numeroj*

4 KOMUNIKADO

5 LA REGNO DE DIO, ĝia veno, kiam ? kiel ?

6 ARKEOLOGIO, radikoj de la historio

7 LA SANKTA SPIRITO, donaco de Dio

8 LA PEZA EKLEZIA HISTORIO, la ŝarĝo de la tempoj

----------

Ni daŭre serĉas kunlaborontojn. Se vi deziras kunlabori, vi povas peti instrukciojn. La *artikoloj* estas petataj, sed vi povas libere sendi mallongajn *kontribuaĵojn, recenzojn, noticojn*, kiuj iel rilatus al la temo.

La aŭtoroj respondecas pri la propra artikolo.

----------

Redakcio, administracio : Philippe Cousson, Le Hameau des Plaids, Nouaillé-Maupertuis, 86340 La Villedieu du Clain, Francujo ; tel. 49 46 80 21, el eksterlande 33 + 49 46 80 21.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

*Directeur de la publication : M. Philippe Cousson.*
*Dépôt légal : mai 1988.*
*Editeur : Philippe Cousson, Nouaillé-Maupertuis*
*Imprimé par : Ets Brun, Poitiers (12 rue des Frères Lumière, Beaulieu, BP 252, 86006 Poitiers Cedex).*

Ĉu valoras la penon paroli pri la spirita vivo ? Ĉu ne estas evidentaĵo, ke kristana vivo estas spirita vivo ? Eble, sed kia spirita vivo ?

En nia nuna mondo, kie la vivo estas bone enkadrigita, kie la religio estas vidata kiel privata afero, havi ĉiaman spiritan vivon, vivi la tutan vivon kiel kristano, diri ke la fido estas la tuto de la vivo, aperas kiel strangaĵo.

Oni povas akcepti, ke kristano dimanĉe matene iras hobie al la preĝejo, kiel aliaj al la stadiono. Oni povas akcepti, ke kristano sola en la ĉambro preĝas, kiel aliaj spektas televidon. Sed, ke liaj ĉiutagaj, ĉiuminutaj penso, diro kaj faro estas gvidataj, inspiritaj de la fido, de la graco, tio estas preskaŭ ne tolerebla.

Tamen tian vivon atendas de ni nia Sinjoro.
Tamen, kiam nia vivo estas plenigita de Li, kiam Li vivas en ni, ni ne povas ne vivi tiel spiritan vivon.

*Mi volas peti pardonon. Mi atendis longatempe artikolojn, kiuj ŝajne perdis tempon, se ne perdiĝis, inter Pollando kaj Francujo. Tio komprenigas la prokraston de tiu ĉi numero.*

La temo de la kvina numero (aprilo 1989) estos :

LA REGNO DE DIO, ĝia veno, kiam ? kiel ?

Mi dezirus scii, kiu pretus verki por ĉi tiu numero artikolon, kiu pritraktus iun aspekton de la ĝenerala temo, aŭ kiu donus specifan vidpunkton. Via kontribuo povas esti mallonga peco aŭ pli longa artikolo.

Jen listo de kelkaj ideoj, kiuj povus instigi vin verki (eĉ reage). Mi tiris ilin el broŝuro pri la Monda Konferenco de Melbourne en 1980. Kompreneble, vi povas proponi ion tute alian kadre de la sama ĝenerala temo.

Vi indiku vian pretecon al la redakcio, prefereble antaŭ la 1-a de julio 1988.

La anonco de la Regno de Dio :

- *je la centro de la predikado de Jesuo.*
- *ĉu invito provi mem realigi ĝin aŭ antaŭ ĉio eskatologia kaj transcenda ?*
- *ne disigebla de la fina rivelo de la justeco de Dio kaj de la pravigo de la homo.*
- *unue promesita al la malriĉuloj.*
- *kun la serĉo por unueco de la popolo de Dio ili estas du nedisigeblaj dediĉoj.*

La Regno de Dio jam nun vivata :

- *Via Regno venu = preĝo de la kristana komunumo.*
- *distingi ĝian ĉeeston ĉirkaŭ ni.*
- *la triunua Dio laboranta en kaj por la mondo.*
- *evidentigita de la releviĝo de Jesuo.*
- *juĝanta aŭ plenumanta la homajn esperojn kaj luktojn ?*
- *la loka eklezio : primicoj de la Regno.*
- *liturgio : ebleco sperti ĝian realecon.*
- *kiel ĉiuj potencoj povas submetiĝi al la potenco de la krucumita reĝo ?*
- *proklamante la sinjoran reĝecon de Dio, la Eklezio relativigas ĉian homan potencon.*

Al ĉiuj ĉi tiuj ideoj, mi aldonas la tiklan demandon : *ĉu nia nuna mondo estas perdota aŭ savota,* kaj *ĉu la Regno de Dio stariĝos konkrete sur nia mondo aŭ ne ?*





# PREĜO - SPIRO DE LA SPIRITA VIVO

**"Ĉio spiranta gloru la Eternulon. Haleluja !"**
**(Psa 150:6)**

La Psalmaro komparas preĝon kun spiro. Fakte, en la Biblio, ulo spiranta devus esti ankaŭ ulo preĝanta. Ni komprenas la ĉi supran versiklon, kiel inviton por ĉiu al glorpreĝo al Dio. Tio devas esti la celo de ĉies vivo.

Sed venas pluraj demandoj pri ĉi tiu spiro de la spirita vivo. Unue, kio estas ĝi, kaj kiu vivas spirite ? Due, kial preĝo kaj spiro estas kompareblaj ? Trie, ni posedas du pulmojn, por spiri, same du eblojn, por preĝi. Kion signifas tio ?

Mi provos, pripensante pri la preĝo, kiel pri spiro de la spirita vivo, respondi ĉi tiujn kelkajn demandojn.

I Nur la vivantoj spiras

Pri la korpa vivo, vivi kaj spiri estas preskaŭ sinonimaj vortoj. Sed, ni devas konstati bedaŭrinde, ke tia klara kompreno ne estas ĉiam akceptita por la spirita vivo. Tamen, ĉiu malkontestas la materian naskon por la fizika vivo. Devus do esti ankaŭ spirita nasko por la spirita vivo.

Tio estas grava, ĉar la profeto Jesaja sciigas, ke niaj pekoj kovras antaŭ ni la vizaĝon de Dio, por ke Li ne aŭdu nin (Jes 59:2). La severeco de Dio eble surprizas nin. Kial Li ne aŭdas nin pro niaj pekoj ? La respondon ni trovas en Romanoj 6:23 :

"La salajro de peko estas morto."

Ĉiu homo korpe vivanta estas mortinta por Dio pro siaj pekoj. Li ne spirite vivas. La Evangelio klarigas al ni, kiel fariĝi vivantaj por la spirita vivo.

Jesuo nomas ĉi tiun realaĵon denove naskiĝi (Joh 3). La nova naskiĝo okazas per la Sankta Spirito. Jesuo asertas klare, ke ekzistas du naskiĝoj : la karna kaj la spirita :

"Tio, kio naskiĝas el la karno, estas karno, kaj tio, kio naskiĝas de la Spirito, estas spirito." (Joh 3:6)

Niaj gepatroj naskis nin por la materia kaj nuntempa vivo, kaj Dio volas naski nin por la eterna kaj spirita vivo. Por tio, Li donis Sian Filon, Jesuon, kiu mortis sur la kruco kaj prenis niajn pekojn pro amo por ni (Joh 3:14,16).

Por spirite vivi, ni devas fari tri paŝojn : penti, fidi al Jesuo kaj akcepti lin.

1. Penti : tio signifas bedaŭri siajn pekojn kaj ŝanĝi sian pensmanieron kaj sian vivon. Oni diras ankaŭ konvertiĝi, tio estas deturniĝi kaj sin turni al Dio. Pento estas parto de la prediko de la kristana Eklezio :

"Ekpentu, kaj baptiĝu ĉiu el vi en la nomo de Jesuo Kristo por forigo de pekoj, kaj vi ricevos la donacon de la Sankta Spirito." (Agoj 2:38)

Penti kaj ricevi la Sanktan Spiriton, jen la nova spirita naskiĝo kun ĝia eskstera konfirmo : la akva bapto.

2. Fidi al Jesuo, kiu repacigis nin kun Dio per sia morto, kaj savis nin per sia vivo (Rom 5:10). Li mem diris :

"Devas la Filo de homo esti levita ; por ke ĉiu, fidanta al li, havu eternan vivon." (Joh 3:14-15)

Tiu ĉi fido enhavas ankaŭ la kredon kaj la fidelecon al la Biblio, la Vorto de Dio.

3. Akcepti persone Jesuon por fariĝi gefiloj de Dio, naskitaj el Li al la spirita vivo :

"Al ĉiuj, kiuj lin akceptis, li donis la rajton fariĝi filoj de Dio, al la kredantoj al lia nomo, kiuj naskiĝis nek el sango, nek el volo de karno, nek el volo de homo, sed el Dio." (Joh 3:12-13)

Ĉiu povas do naskiĝi por persona spirita vivo. Por tio, sufiĉas fari sincere la tri simplajn paŝojn. Tiu, kiu naskiĝis spirite, havas la spiritan kaj eternan vivon. Ĝi estas la vivo de Jesuo en li, kiel skribis la apostolo Paŭlo :

"Kun Kristo mi krucumiĝis, tamen mi vivas ; jam ne mi mem, sed Kristo vivas en mi." (Gal 2:20)

La ĉefa sperto de la kristanoj estas priskribita ĉi tie. Sen ĝi ne ekzistas vera spirita vivo. Ricevinte la vivon de Jesuo, ni povas kaj devas komenci spiri, tio estas preĝi, por vivteniĝi.

## II Preĝo : enspiri, elspiri kaj eĉ sopiri

Mi ŝatas la zamenhofan tradukon de la versiklo 131 en la 119-a Psalmo :

"Mi malfermas mian buŝon kaj enspiras, ĉar mi deziregas viajn ordonojn."

Certe, preĝi estas enspiri la ĉeeston de Dio. Preĝo estas deziregо de Li kaj de Lia Vorto, la Sanktaj Skriboj. Kiam ni





meditrigardas Dion en Lia Vorto, ni ricevas Lin en ni kiel aeron puran kaj vivigantan.

Unu el la plej belaj versikloj en la tuta Biblio estas por mi la jena :

"Ni ĉiuj, per nevualita vizaĝo spegulante la gloron de la Sinjoro, transformiĝas en la saman bildon, de gloro al gloro, kiel el la Sinjoro la Spirito." (1 Kor 3:18)

Se la pekoj kovras la vizaĝon de Dio por ni, la savo malkovras nian por Dio. Ni povas veni al Li nevualitaj kaj rigardadi Lian gloron.

Preĝo estas ĉi tiu enspiro de la Sankta Spirito por speguli la gloron de la Patro kaj fariĝi vivanta bildo de Jesuo Kristo. La preĝanto ricevas la gloron de Dio kaj disdonas ĝin ĉirkaŭ si.

Sed spiro ne nur estas enspiri, ĝi estas ankaŭ elspiri. Ni elspiras preĝante, kiam ni petas, dankas, laŭdas kaj adoras.

La kristano estas laboranto kun Dio. Li devas peti, ne por ŝanĝi la Dian volon, sed por konsenti pri ĝi. La kondiĉoj por la plenumo de nia preĝo estas, ke ni restadu en Jesuo, kaj ke liaj vortoj restadu en ni :

"Se vi restadas en mi, kaj miaj vortoj restadas en vi, petu kion ajn vi volos, kaj tio estos farita por vi." (Joh 15:7)

Ni rimarkas, ke efika preĝo estas apogita sur la vortoj de Jesuo. Ne ekzistas spirita vivo sen ĉiutaga legado de la Biblio, ĉar la fido venas de la Vorto de Dio (Rom 10:17). Sed atentu ! Multaj personoj legas la Skribon, sed ili ne praktikas ĝiajn instruojn. Tio estas tute vana kaj senutila.

Kiam Dio respondas al niaj petoj, ni ne forgesu danki Lin ! Tiu ĉi danka preĝo estas ĉefa en la spirita vivo. Ĝi estas ankaŭ la centro de la eklezia vivo, ĉar ĝi akompanas la Sinjoran vesper-manĝon, kiu manifestas la korpon de Kristo en la komunumo (1 Kor 11:24).

Kaj kion mi diros pri laŭdo kaj adoro ? Ni scias, ke Dio serĉas adorantojn laŭ spirito (spirite vivantajn) kaj vero (laŭ la Biblio). Dio tial serĉas, ĉar tiuj ĉi homoj estas maloftaj. Kiu el ni deziras, ke Dio haltu sian serĉadon, dirante al Li : 'Ho Dio, mi volas esti via adoranto laŭ via koro !' (Joh 4:22-24)

Mi ne ankoraŭ elĉerpis mian temon. Spiro povas fariĝi sopiro. En P.I.V. ni trovas por "sopiri" : esprimi per forta longa enspiro

sian deziregon. Tiu ĉi senco interesas nin. La psalmisto konis similan senton, kiam li preĝis :

"Kiel cervo sopiras al fluanta akvo, tiel mia animo sopiras al Vi, ho Dio." (Psa 42:1)

Jes, la preĝanto sopiras ofte al Dio. Li deziregas Lin pli ol ĉiujn aliajn aferojn.

"Mia animo soifas Dion, kiam mi venos kaj aperos antaŭ la vizaĝo de Dio ?" (Psa 42:2)

Fine, ni lernas, ke la Sankta Spirito ankaŭ sopiras en ni, por nin helpi en preĝo :

"La Spirito ankaŭ helpas nian malfortecon ; ĉar ni ne scias, kiel preĝi dece, sed la Spirito mem propetadas por ni per ĝemoj neeldireblaj." (Rom 8:26)

En la franca traduko de Louis Segond, *sopiroj* anstataŭas la vorton *ĝemoj*. Ni ne estas solaj en preĝo, sed la Sankta Spirito mem estas kaj preĝas en, kun kaj por ni. Tio estas kuraĝigo en persisto malgraŭ nia malforteco kaj nia malsperto.

III Spiri per la du pulmoj

La apostolo Paŭlo distingas du preĝmanierojn en la unua epistolo al la Korintanoj. Ili estas kiel niaj du pulmoj, kiuj ambaŭ estas necesaj por bone spiri.

"Se mi preĝas per lingvo, mia spirito preĝas, sed mia intelekto estas senfrukta. Kio do estas ? Mi preĝos spirite, kaj mi preĝos ankaŭ intelekte." (1 Kor 14:14-15)

La kristanoj povas do preĝi spirite aŭ per lingvo : unua pulmo, kaj ankaŭ intelekte aŭ per la intelekto : dua pulmo. Mi devas forte diri, por eviti miskomprenon, ke mi skribas nur pri la persona preĝo. La sama Paŭlo donas konsilojn kaj ordonojn, kiuj devas esti obeataj por la eklezia preĝo (vidu 1 Kor 14:19,27-28).

Mi devas ankaŭ precizigi, ke la preĝo per lingvo havas nenion komunan kun ekstazo. Mi praktikas tian preĝon ĉiutage ekde pluraj jaroj, sed neniam ekstazo falis sur min, kiel sur la apostolon Petron (Agoj 10:10). Preĝi per lingvo estas do ago libera kaj memvola.

Plej simple, Paŭlo diras, ke nia intelekto ripozas kaj estas senfrukta, kiam ni preĝas spirite per lingvo, ĉar neniu krom Dio komprenas nin, ne eĉ ni mem. Persone, mi bezonas por mia kunuleco kun Dio lasi miajn ĉiam kurantajn pensojn en ripozo.





Se la intelekto estas senfrukta, la spirito kaj la spirita vivo ricevas multajn benojn, kiam oni preĝas per lingvo. Fakte, tiu, kiu tiele preĝas, parolas al Dio, diras misterojn en la spirito, kaj edifas sin mem (1 Kor 14:2-4).

Mi bone scias, ke ĉiu tiu praktiko kaŭzis multajn troigojn kaj malordojn dum publika ekzercado en pluraj movadoj. Sed la homaj faloj ne kontraŭas la Dian veron. Paŭlo dankis Dion pro sia ebleco preĝi spirite, kaj li ordonis ne malpermesi paroli per lingvo (1 Kor 14:18,40).

Ankoraŭ hodiaŭ, la lingvopreĝo estas donaco de la Sankta Spirito al tiuj, kiuj opinias, ke ĝi estas utila por la spirita vivo, kaj kiuj kredante petas ĝin al la Patro en la nomo de Jesuo.

Sed mi ne malestimas mian duan pulmon, kiu konsistas en intelekta preĝo. Dio ne demandas al ni neniigi nian menson kaj ĝiajn eblojn, sed Li volas ilin renovigi :

"Por ke vi renoviĝu rilate al la spirito de via menso, kaj surmetu la novan homon." (Efe 4:23-24)

La uzado de nia penskapablo estas ankaŭ tute necesa dum preĝo. Ni devas ankaŭ preĝi kompreneble en lingvo konata de ni kaj de la aliaj personoj (1 Kor 14:16-17).

Oni certe komprenas, ke spiri per la du pulmoj signifas malkonsenton de malekvilibra spirita vivo. Por tio, ni devas esti fanatikaj nek kontraŭ unu preĝformo, nek kontraŭ alia : per spirita lingvo aŭ per konata lingvo, spirite aŭ intelekte. Ni do preĝu per la du manieroj ! Ni do spiru per la du pulmoj !

Konkludo

Preĝo estas necesega al la spirita vivo, kiel spiro al la natura vivo. Ni devas malzorgi nenion por atingi la celon de vivo de preĝo. Precipe, ni devas discipliniĝi kaj ordigi nian tempon, por preĝi. Ni ne diru, ke ni ne havas tempon, ĉar ni ĉiam trovas ĝin por tio, kio plaĉas al ni !

Preĝi estas la verko de la tuta spirita vivo. Ni scias, kiam ni komencas, kaj ni iros ĝis la vido de Dio tra la morto.

"Sinjoro, al kiu ni iru ? Vi havas la vortojn de eterna vivo !" (Joh 6:66)

Lastan rimarkon ! Jesuo instruis en la Evangelio, ke nur Dio povas ricevi preĝoservon kaj adoron :

"Al la Eternulo, via Dio, vi adorkliniĝu, kaj al Li sola vi servu !" (Mat 4:10)

## PREĜO - SPIRO DE LA SPIRITA VIVO

Ĉiu kristano, kiu legas la Biblion, scias ankaŭ, ke la unusola peranto inter Dio kaj homaro estas Kristo :

> "Ekzistas unu Dio, kaj unu interulo inter Dio kaj homoj, homo, Kristo Jesuo, kiu sin donis kiel elaĉetaĵon por ĉiuj." (1 Tim 2:5-6)

Kristana preĝo estas fakte adresita al la Patro per la Filo Jesuo Kristo en la Sankta Spirito. Alia praktiko ne estas vere kristana kaj biblia.

Jacques Lemaire, Belgujo

Jacques LEMAIRE *(ĵak lömer)*, franco (1950), studis teologion en romkatolika seminario antaŭ sia konvertiĝo, servis kiel evangelizisto en Francujo kaj Belgujo. Eklernis Esperanton en 1974. De 1980 fondinto kaj pastoro de nedenominacia eklezio en Belgujo.





## LA PSALMOJ - NUTRAĴO DE LA SPIRITA VIVO

Se ni parolas pri la psalmoj, ni pensas ĉefe pri la 150 psalmoj de la Biblia libro Psalmaro, verŝajne pli-malpli hazarda kolekto de religiaj kantoj, uzataj kaj konataj en Izrael. Ne estas mia tasko klarigi la demandon pri la aŭtoro kaj pri la tempo de fariĝo. Estas certe, ke la nuna Psalmaro jam apartenas al la hebre-lingva Biblio. La psalmoj estis kaj estas uzataj kiel privataj kaj oficialaj liturgiaj preĝoj en la tempo de la Malnova Testamento kaj ankaŭ en la hodiaŭa juda liturgio.

La psalmoj estas ankaŭ la ponto inter la Malnova kaj la Nova Testamento, inter la Di-popolo de la malnova interligo kaj la Di--popolo de la nova interligo. La juna kristana komunumo preĝis ilin, ekz-e Agoj 1:20 ; 2:25-28 ; 2:34-35 ; 4:25-26. Tio signifas, ke la psalmoj estis bone konataj ĉe la kristanaj preĝantoj. Ankaŭ Jesuo mem konis kaj preĝis la psalmojn. La evangelioj rakontas ĉiam denove, ke Jesuo vizitis la Di-servon en la sinagogo. Tie Li preĝis kune kun Sia popolo la psalmojn. La plej bone konata teksto estas Mat 27:46 (Mk 15:34). La krucumita Jesuo preĝas la 22-an psalmon, Li krias al Dio la Patro, kun la vortoj de tiu ĉi psalmo. Ankaŭ la lasta vorto de Jesuo laŭ Luko estas vorto el la 31-a psalmo :

> "Patro, en Viajn manojn mi transdonas mian spiriton." (Lk 23:46)

La Psalmaro estis la preĝlibro de Jesuo Kristo dum lia tera vivo.

La Psalmaro, la libro de psalmoj havas specialan pozicion inter la diversaj libroj de la Biblio. Ni ofte diras - iomete reduktite - La Biblio estas la vorto de Dio, parolo de Dio. La psalmoj estas - laŭ fariĝo, laŭ la origino - parolo de homo, preĝo de homo. Homo, homoj parolas al Dio, preĝas al Dio en la diversaj vivsituacioj. Kaj nun ni diras, ke Dio parolas al ni per la homa vorto de psalmoj. Mi opinias, ke tiu ofte estas la vojo, la maniero, kiun Dio elektas por paroli al ni. Li uzas homojn kaj ili devas aŭ rajtas diri al ni la vorton de Dio, la ordonon de Dio. Kelkfoje ili mem ne scias !

En la psalmoj speguliĝas ĉiuj spertoj de homa vivo. Homoj laŭdas kaj gloras Dion, ĉar ili spertas Lian helpon aŭ ĉar ili admiras Lian potencon aŭ la belecon de Lia kreaĵo. Ili krias al Dio el la malespera situacio de malsaneco aŭ de milito, de persekutado aŭ de aflikto. Aliaj psalmoj rakontas pri la konfido de homo, pri la fido de homo, kiu scias sin gardata kaj ŝirmata en la

fideleco de Dio.

Ekzistas ankaŭ grupo de psalmoj, tre stranga kaj malfacile komprenebla : la malben-psalmoj. Ĉi tie homo krias al Dio el la ekstrema danĝero kaj mizero, li krias al Dio el la plej profunda timego. Li scias kaj konas neniun alian eliron ol la pereon de siaj malamikoj. Ĉu tio estas preĝo, preĝo laŭ la volo de Dio, se iu deziregas la pereon de la malamiko ? Verŝajne ne ! Sed la intenco kaj la kredo de ĉi tiu preĝo estas verŝajne, ke la preĝanto konfidas, konfidegas, ke Dio kapablas savi lin kaj ankaŭ savos lin, eĉ el ĉi tiu senespera situacio. Por la preĝanto ekzistas nur ĉi tiu vojo : pereu la malamikoj !

Mi jam skribis, ke la juna eklezio, la juna kristana komunumo preĝis kaj kantis la psalmojn. Ili transdonis ĉi tiun kutimon al la sekvantaj generacioj. Oni spertis kaj spertas ĉiam denove, ke la psalmoj, la preĝoj de la malnova Di-popolo ankaŭ taŭgas por la nova Di-popolo. La preĝantoj sentis, ke ĉi tie, en la psalmoj, oni trovas verajn preĝojn, kiujn oni povas transpreni kiel propran preĝon. La enhavo estas sentempa, ĉiam aktuala.

La psalmoj, la liturgiaj tekstoj de la malnova Di-popolo fariĝis liturgiaj tekstoj de la nova Di-popolo. La psalmoj estis kaj estas la kantoj de la solena procesio, komence de la Di-servo, komence de la sankta meso, je la preparo al ofero kaj en la Sankta Manĝo, dum la komunio. Post la Dua Vatikana Koncilio[1] psalmo estas kantata post la 1-a legaĵo de la sankta meso kiel la respondo de la Di-popolo al la Parolo, al la Vorto de Dio.

Alia ekzemplo por la liturgia uzado de psalmoj en la katolika eklezio estas la breviero, la ĉiutaga preĝo de ĉiuj pastroj kaj monaĥinoj kaj monaĥoj. Eble la breviero kreskis el la komuna preĝo de juna kristana komunumo. Mi opinias, ke ĉi tie ankaŭ estas signo, ke oni spertas la valoron de psalm-preĝo. La psalm-preĝo de ĉiuj religiuloj en la eklezio devas esti treege malnova. En la regulo de Sankta Benedictus (Benedikto) el la 5-a jarcento ni jam trovas detalan instrukcion pri la kantado de la psalmoj por la sep tagaj "horoj" kaj por la nokta preĝo. Laŭ la regulo de Sankta Benedictus la monaĥoj preĝu, kantu en unu semajno la 150 psalmojn. Hodiaŭ, en nia tempo, oni distribuas la 150 psalmojn tiamaniere, ke oni preĝas ilin en 2 aŭ 4 semajnoj.

Se mi trafoliumas nian german-lingvan preĝlibron *Gotteslob* (Di--laŭdo), mi konstatas, ke multaj laŭd-kantoj kaj kantoj de konfido aŭ de peto estas verkitaj laŭ psalmoj. La verkistoj vivis en la 15-a jarcento aŭ dum la tempo de Martin Luther kaj ankaŭ en niaj





tagoj, ekz-e Edith Stein (*edit ŝtajn*), la fratulino[2] Teresia Benedikta a Cruce, mortinta en germana koncentrejo. Ekzistas ankaŭ franca Psalmaro el la jaro 1562. Modernaj germanaj verkistoj provas traduki ne nur la psalmajn vortojn, sed ankaŭ la spertojn de la psalmisto rilate al nia nuna lingvo kaj nia nuna sperto, ekz-e Jörg Zink (*cink*), protestanta pastoro en Stuttgart. Ekzistas ankaŭ en Germanujo tradukoj de psalmoj en dialektoj, ekz-e en la ŝvaba lingvo, kaj en la kolonja. En ĉi tiu traduko la psalmoj fariĝas tre personaj, tre proksimaj al la nuna preĝanto. Mi opinias, ke tiuj tradukoj montras, ke la psalmoj vere vivas en la koroj de homoj. Oni sentas, oni spertas, ke la psalmoj kortuŝas la homojn, ankaŭ hodiaŭ.

Ĝis nun mi parolas pri la oficiala uzo de psalmoj, kiu montras, ke la psalmoj vivas en la Eklezio kaj ke ili parolas al la homoj de diversaj epokoj. Sed kiel povas la psalmoj nutri nian personan preĝon, kiel ili nutras mian spiritan vivon ? Mi estas religiulino. Mi preĝas ĉiutage psalmojn. Mi volas provi, rakonti al vi kelkajn spertojn, kiel la psalmoj povas fariĝi nutraĵo por la spirita vivo.

Se mi volas preĝi psalmojn, mi bezonas motivigon, kial mi elektas ilin. Ne sufiĉus, ke mi kiel monaĥino preĝas la psalmojn de la breviero nur, ĉar tio estas mia devo. Nur mia buŝo preĝus, ne mia koro, ne mi mem. Nature, mi ne povas identiĝi kun ĉiu vorto de la psalmoj, kiujn mi preĝas dum unu horo, sed mi devas esti preta preĝi kun la eklezio kaj nome de la eklezio. Povas esti, ke dum la preĝado unu vorto, unu frazo de iu psalmo falas en la koron kaj akompanas min tra la tuta tago. Mi spertis, ke mi preĝadis psalmon dum jaroj kaj subite mi rimarkas frazon, kiu kortuŝas min. Mi neniam rimarkis tiun vorton antaŭe.

La situacio, preĝi ĉiutage la brevieron estas speciala afero. Kion oni povas fari por preĝi psalmojn, por nutri la spiritan vivon helpe de psalmoj ? Ekzistas diversaj vojoj.

1. Mi elektas psalmon, kiu parolas pri la sama situacio, kiun mi momente spertas. Multe da psalm-libroj havas liston de psalmoj laŭ iliaj diversaj enhavoj. Povas jam esti tre konsole, ekz-e se mi estas malespera aŭ afliktita, se mi rimarkas, ke aliaj homoj spertas la samon kiel mi nun spertas. Mi legas malrapide la tekston. Mi provas legi la tekston en la ritmo de mia spiro. Tio signifas : Mi enspiras, kaj mi legas la unuan parton de la psalm-verso. Legante mi ja elspiras, kaj poste mi elspiras ankaŭ la reston de la aero. Trankvile kaj profunde mi denove enspiras kaj poste mi legas la duan parton. Per la konscia spirado mi trankviliĝas kaj iom post iom mi kapablas medite preĝi la psalmon.

2. Alia ebleco estas preĝi psalmon kiel maten-preĝon aŭ nokt-preĝon. Ĉi tie mi eble nur preĝante legas la tekston - aŭ legante mi preĝas. Mi uzas psalmon kiel alian jam formitan preĝ-tekston.

3. Mi ankaŭ povas uzi psalmon kun antifono. Antifono estas mal-longa frazo, kiu donas temon, vidpunkton, sub kiu mi povas preĝi la psalmon. Povas esti frazo aŭ vorto el la Nova Testamento aŭ alia vorto. Se mi ekz-e preĝas la 23-an psalmon : "La Eternulo estas mia paŝtisto..." kun la antifono "Diru al la invititoj : Jen mi preparis la manĝon. venu al la edziĝa festo ! Haleluja !", mi vidas Jesuon Kriston, kiu alvokas min, volas min alvoki al la festeno de la ĉielo. La alia antifono : "sur verdaj herbejoj Li ripozigas min" montras al mi Dion, kiu amas min kaj zorgas pro mi kiel paŝtro, ĉiam. Kun la antifono : "Se iu manĝos de ĉi tiu pano, tiu vivos eterne", parolas al mi pri Jesuo, la viva pano, la eŭkaristia pano. Tiel mi preĝas la saman psalmon kun diversaj intencoj, mi meditas diversajn bildojn de Dio. La antifonoj povas helpi min, rigardi Dion, al kiu mi preĝas el diversaj vidpunktoj.

4. Alia maniero, kiel la psalmoj povas esti nutraĵo de spirita vivo estas la meditado. Mi elektas psalmon kaj mi serĉas kaj faras lokon de trankvilo kaj de silento. Nun mi legas la tekston unufoje, dufoje, kelkfoje malrapide trankvile, laŭte aŭ mallaŭte. La apostolo Paŭlo diras, ke "la kredo venas per aŭdado" (Rom 10:17). Se mi legas laŭte la tekston, mi aŭdas la tekston, mi povas aŭskulti. Laŭ mia sperto mi pli bone komprenas tekston, se mi legas ĝin laŭte. Sed tio ne gravas. Estas verŝajne diversa afero ĉe la diversaj homoj. Legante la tekston de psalmo mi demandas min, kion la teksto volas diri al mi. Mi demandas Dion, kion Li volas diri al mi per ĉi tiu teksto, per la vorto de psalmisto. Kaj, se mi vere malfermiĝas, se mi lasas min malfermi de Dio, la psalmo, la vortoj de psalmisto povas gvidi min al persona preĝo, al persona parolado kun Dio.

5. Se iu ofte preĝas psalmojn, tiu lernas multajn vortojn parkere kaj povas okazi, ke vortoj de psalmoj vere vivas en ĉi tiu persono, kun ĉi tiu persono. Ekz-e : oni admiras la grandecon kaj la bonecon de Dio kaj oni preĝas :

> "Ho Eternulo, nia Sinjoro, kiel majesta estas Via nomo sur la tuta tero !" (Psa 8:1)
> "La ĉielo rakontas la gloron de Dio." (Psa 19:1)

rigardante la belecon de la naturo, aŭ la noktajn stelojn, oni povas preĝi tiujn vortojn. Dum tempo de mallumo kaj de zorgoj, oni eble memoras la vorton :

> "La Eternulo estas mia lumo kaj mia savo ! Kiun mi devas timi ?" (Psa 27:1)





Alia ekzemplo :

> "Mia Dio, mia Dio, kial Vi forlasis min ?" (Psa 22:1)

dum tempo de malespero kaj soleco, kaj :

> "Savu min, ho Dio, ĉar la akvoj venis ĝis mia animo." (Psa 69:1)

aŭ

> "Aŭskultu, ho Dio, mian krion, atentu mian preĝon !" (Psa 61:1)

Ankaŭ la peto, ke Dio pardonu nin, estas trovebla en la psalmoj.

> "Korfavoru min, ho Dio, laŭ Via boneco ; laŭ Via granda kompatemeco elstreku miajn pekojn." (Psa 51:1)

La vortoj de konfido estas tre multnombraj en la psalmoj. Estas tre bona nokt-preĝo, se mi enlitiĝas kun la vorto el la 4-a psalmo :

> "Pace mi kuŝiĝas kaj tuj endormiĝas ; ĉar Vi, ho Eternulo, loĝigas min sola en sendanĝereco." (Psa 4:8)

Alia vorto :

> "Ho Eternulo, ĝis la ĉielo atingas Via boneco ; Via vereco ĝis la nuboj. Via justeco estas kiel montoj de Dio, Viaj juĝoj estas granda abismo ; homojn kaj brutojn Vi helpas, ho Eternulo !" (Psa 36:5-6)

Preskaŭ ĉiu psalmo parolas pri la danko de homo al Dio kaj ĉi tiu danko estas samtempe la laŭdo de Dio :

> "Gloru la Eternulon, ĉar Li estas bona, ĉar eterna estas Lia boneco." (Psa 106 ; 107 ; 136 ; ktp.)

Mi povus daŭrigi la nombradon de psalm-vortoj. La citaĵoj estas nur malgranda, hazarda elekto, kiu volas helpi vin, serĉi vortojn kiuj parolas al via koro kaj akompanas vin tra via vivo.

6. Mi opinias, ke eble iu prenas la Psalmaron kaj komencas preĝi psalmojn, sciante, ke ankaŭ Jesuo preĝis la psalmojn. Oni ankaŭ ŝatas legi libron, preĝi tekstojn, kiujn amata homo ŝatas aŭ ŝatis. Kial mi ne preĝu psalmojn, kiujn preĝis Jesuo ?

7. Ankaŭ la hazarda preĝo de psalmoj povas nutri mian spiritan vivon - vi eble konas la vorton, ke la hazardo estas la pseŭdonimo de Dio - se mi lasas min alparoli pri la vortoj aŭ pri la kantado aŭ la ĉantado de psalmoj. Se la teksto estas ne-konata al mi kaj mi atenteme aŭskultas aŭ mi aŭskultas al la melodio, Dio povas paroli al mi.

8. Komence mi jam parolis pri la malben-psalmoj. Ĉu oni ankaŭ povas preĝi ĉi tiujn psalmojn, povas preĝi ilin kiel kristano ? Mi opinias, ke ekzistas okazoj, kiam mi povas preĝi tiujn psalmojn. Mi ne povas preĝi ilin kontraŭ homo, kontraŭ miaj gefratoj, kontraŭ la gefratoj de Jesuo Kristo, savataj de Jesuo. Sed ĉu la malbono,

kontraŭ kiu mi preĝas, ne povus esti en mi mem, mia peko, la tentado al peko ? Mi petegas Dion helpe de fortaj vortoj, kiujn uzis la psalmisto, mi petegas Dion liberigi min de malbono. Tiuj psalmoj estas preĝo en malespera, senespera situacio de psalmisto, kaj Dio estas la unusola helpisto. Mi jam diris. Kial ni ne preĝu tiamaniere, kiam ni estas en senespera situacio. Dio konas nin kaj nian situacion. Li komprenas nin, Li ankaŭ komprenas niajn strangajn vortojn. Ili estus finfine vortoj de konfido kaj de fido.

9. Finfine, oni povas ankaŭ legi la psalmojn nur, ĉar oni ĝojas pri la poezio de la tekstoj. Kial ne ? Mi opinias, ke la psalmoj povas nutri spiritan vivon ankaŭ helpe de ĉi tiu vojo, de ĉi tiu maniero. Estas eble danĝero de nia tempo, ke ni volas fari, verki multon kaj ne volas lasi ion al la hazardo. Sed spirita vivo estas antaŭ ĉio donaco de Dio. Kaj Dio, kiu "skribas rekte, ankaŭ sur nerektaj linioj," povas ankaŭ uzi la poezion por paroli al ni. Ni lasu nin nutri de Li, de Lia boneco kaj de Lia amo !

Mi provis montri al vi kelkajn eblecojn, kiel la psalmoj povas nutri nian spiritan vivon. Mi scias, ke ekzistas aliaj vojoj. Verŝajne ĉiu havas sian metodon aŭ devas serĉi sian metodon, por ke la psalmoj nutru la spiritan vivon. Sed estas ĉi tie la sama afero kiel estas kun la nutraĵo por nia korpo : Oni devas provi ĝin, oni devas uzi ĝin ; alikaze ĝi ne povas helpi nin, ne povas nutri nin.

Theotima Rotthaus, F. R. Germanujo

notoj

1) Vidu en *Evangeliaj Kajeroj*, 1, 1987, pp. 21-25. - *La Biblio post la Dua Vatikana Koncilio.*

2) Termino proponita de la aŭtorino por diri fratino en monaĥa signifo.

Theotima ROTTHAUS, germanino (1937). Studis teologion kaj matematikon en Münster (Vestfalio). De 1960 benediktanino en la monaĥejo St Lioba en Freiburg/Breisgau. Ŝi poste studis en la pedagogia universitato en Freiburg. Instruas religion kaj matematikon. Esperantistino de 1981. Sendas ĉiumonate biblioleteron en Esperanto.





## SPIRITE VIVI EN MATERIALISMA ETOSO

Nia temo estas plena de tensio. Ne temas pri kontraŭaĵo filozofia, ontologia, nek pri kontraŭopono de spirita kaj materia orientado, sed pri konfronto inter la kristana vivmaniero kaj la medio en kiu ĝi estas realigenda. jam la superskribo de nia artikolo montras, ke la spirita vivo estas ebla, kvankam videble kun certa malfacilaĵo kaj necesa strebado.

Ni pripensos nian temon en tri partoj :
1. tasko komisiita al la kristanoj : spirite vivi,
2. obstaklo en ĝia plenumo : materialisma etoso,
3. plenumado de tasko malgraŭ la obstaklo : spirite vivi en materialisma etoso.

### 1. Tasko komisiita al la kristanoj.

Al ĉiuj homoj donacis la Kreinto vivon korpan kaj animan (fizikan kaj psikan). Al la kristanoj estas donata krome la rajto kaj tasko vivi ankaŭ spirite.

Ĉi tie estas necese substreki : sub "spirita vivo" ni ne komprenas vagan spiritualecon de iu ajn religio, sed la formigo de vivo per la Evangelio de Jesuo Kristo. Kristo elaĉetis nin per la ofero de sia vivo por niaj pekoj, per sia sango elverŝita por ni. Spirite vivi ne signifas lasi sin gvidi de propra homa spirito kiel la pli bone aŭ eĉ perfekta parto de homa personaĵo, sed esti gvidata de la Sankta Spirito, Spirito de Dio kaj de Kristo (kp. Rom 8:14).

Spirite vivi signifas vivi en kunuleco kun Dio, kiu estas la Donacinto de vivo, kaj komuniki kun Li. Tia komunikado estas duflanka : Dio parolas al ni en Sia Vorto, kaj ni parolas al Li en nia preĝo. Certe tia komunikado estas specifa laŭ la nekomparebla Partoprenanto en la dialogo :

> "Dio estas Spirito, kaj Liaj adorantoj devas adori Lin laŭ spirito kaj vero." (Joh 4:24)

La Vorto de Dio parolanta al ni estas donaco kaj tasko, promeso kaj ordono, Evangelio kaj leĝo. Ni vivas spirite el tio, kion Dio faris, precipe kion Li faris por ni en Jesuo Kristo kaj en ties verko de savo. Aliflanke ni vere devas vivi en tiu ĉi Dia graco, ne nur pripensi aŭ senti ĝin. La Vorto de Dio postulas nian tutan vivon, ĉar nia tuta vivo havas duunuan celon : glori Dion kaj utili al la proksimulo. El la Evangelio de Kristo rezultas kristanaj

dogmatiko kaj etiko. Ĝi estas por ni la plej alta normo de la kristanaj fido kaj vivo : ĝi decidas ne nur, kion ni kredu, sed ankaŭ kiel ni agu.

Al la spirita vivo apartenas ankaŭ la kunuleco de la kredanta popolo de Dio kiel gefratoj. Ĉiuj tri elementoj de la kristana spirita vivo, nome la Vorto de Dio, la preĝo kaj la kunuleco kun Dio kaj kun la gefratoj, unuiĝas en la Diserva kunveno de la eklezio (kp. Ag 2:42).

Fine spirite vivi signifas ankaŭ havi esperon.

> "Ĉar kiu semas por sia karno, el la karno tiu rikoltos putradon ; sed kiu semas por la Spirito, el la Spirito li rikoltos eternan vivon." (Gal 6:8)

Tiele skribas la apostolo Paŭlo, kaj aliloke li diras :

> "Pro tio ni ne senkuraĝiĝas ; sed kvankam nia ekstera homo kadukiĝas, tamen nia interna homo renoviĝas tagon post tago." (2 kor 4:16)

Tio estas perspektivo esperplena : iam montriĝos Kristo kaj ni estos similaj al Li ! (Kol 3:4 ; 1 Joh 3:2) La kredo havas la pezocentron en la estonteco. La spirita vivo estas celado al tio, kio devas esti, sed ankoraŭ ne estas videbla.

Spirite vivi signifas sekvi longtempan perspektivon de espero, ne vivi de tago al tago. Ne al la unutaga insekto, sed al la anĝeloj devas simili la infanoj de Dio (kp. Mat 22:30). Kaj ĉiu, eĉ la plej longa surtera vivo, daŭras malpli ol unusola tago en la okuloj de Dio (Psa 90:4).

Kio do estas spirite vivi ?

- havi kunulecon kun la Sinjoro pere de la Vorto de Dio kaj de la preĝo,
- esti gvidata de la Sankta Spirito (ne de kiu ajn spirito !),
- havi forton por diferenciĝi ("ne konformiĝu al ĉi tiu mondo" Rom 12:2),
- atestadi pri Jesuo Kristo kiel unusola Savanto,
- havi personan esperon pri savo kaj pri eterna vivo (1 Kor 15:19)
- vivi atendante la Regnon, en ties antaŭpreno. La Sankta Spirito estas la antaŭgarantiaĵo (2 Kor 1:22 ; Efe 1:14) kaj nur en Li eblas spirite vivi !

Se oni diras pri iu, ke li estas "spirita homo", oni antaŭ ĉio pensas, ke li estas gvidata de la Sankta Spirito. La kontraŭon oni esprimas per la vorto "karna". La Nova Testamento tiel nomas la sindediĉon al la aferoj de ĉi tiu neelaĉetita mondo. Estas malmilda juĝo, se Paŭlo devas diri al la korintanoj (1 Kor 3:1-3), ke ili





ankoraŭ estas karnaj, beboj en Kristo, al kiuj ankoraŭ estas necese klarigi la bazajn verojn de la kristanismo.

La spirita orientado nepre elvokas konflikton.

> "Ĉar la karno deziregas kontraŭ la Spirito, kaj la Spirito kontraŭ la karno ; ĉar ĉi tiuj interbatalas reciproke." (Gal 5:17)

Apostolo Paŭlo admonas la kristanojn galatajn kaj aliajn :

> "Iradu laŭ la Spirito, kaj la deziregon de la karno vi ne plenumos." (Gal 5:16)

La kristanoj devas vivi spirite, kio tuŝas pensadon kaj agadon. La supernaturo certe ne signifas ion nenaturan aŭ kontraŭnaturan. Sed la valorskalo orientita al Dio konfliktas kun la skalo, kiu plialtigas la valorojn imanentajn, enmondajn. La homo servas aŭ supren al Dio, aŭ malsupren al aĵoj. Sed ĉiukaze li al iu aŭ io servas ! Kaj li ne povas samtempe servi al du sinjoroj (Mat 6:24).

El la supre menciita citaĵo (Gal 5:16) povus ŝajni, ke la apostolo kontraŭstarigas la spiriton kaj la karnon : la spiriton kiel valoron pozitivan, la karnon negativan. Sed ni ne preterviduu la gravan vorton "deziregо", kiu nin gvidas en la sferon de pensado. Simile en 1 Joh 2:17. Homaj deziroj kiel motivo de agado estas afero psikologia, ne nur filozofia. La Biblio karakterizas tiujn deziregojn ĉiam negative, kvankam per diversaj atributoj.

La plej ofta konekto estas la frazo "deziregо(j) de karno". Novtestamenta greka lingvo diferencas inter σωμα (*sōma*, korpo) kaj σαρξ (*sarx*, karno). La unua vorto indikas la fizikan aspekton de la homa naturo, la dua la pekan vivdirekton. La peko ne estas kaŭzita de la korpa vivo, sed de falsaj penso kaj deziro.

> "Ĉar el la koro eliras malvirtaj pensoj, mortigoj, adultoj, malĉastaĵoj, ŝteloj, falsatestoj, blasfemoj,"

diris Jesuo (Mat 15:19). La peka deziregо nur parte celas materiajn objektojn. Krom la deziregо de la karno, apartenas al la peka vivmaniero ankaŭ la deziregо de okuloj kaj la fiereco de vivo (1 Joh 2:16).

La kristano ne negas la realaĵojn de la materia mondo. Li vivas meze de ili kaj akceptas la Di-kreitan mondon el la manoj de Dio, kiel verkon bonan. Sed super teraj valoroj li vidas valorojn transcendantajn ĉi tiun mondon kiel la gracon de Dio en Jesuo Kristo, la verkon de la Sankta Spirito, la regnon de Dio. Oni povus tion esprimi tiamaniere, ke por la kristano la realeco havas unu dimension pli. Se la nekredulo vivas en la tri dimensioj de la fizika mondo, la kristano scias pri la kvara dimensio, per niaj sensoj nevidebla, sed eksterordinare disvastiganta tion, kio ekzistas.

Unu el la antikvaj ekleziaj patroj skribis pri la kristanoj, ke ili enloĝas la samajn landojn kiel la nekristanoj, kaj manĝas la samajn manĝaĵojn, vestas sin simile, sed ke ili tamen estas homoj diferencaj. Ilin gvidas aliaj principoj. Ĉiu patrujo estas por ili fremdlando, kaj ĉiu fremdlando estas patrujo. Ili ne havas restantan loĝlokon surtere, sed ili serĉas la estontan (Heb 13:14).

## II La obstaklo por la spirita vivo

Se la kristanoj ricevis la privilegion kaj devigon vivi spirite, la materialisma etoso malhelpas al tio. Laŭ la vortaroj etoso indikas moralan vidpunkton kiel bazon de pensado kaj agado, la ĝeneralan etikan karakteron. Pli ol iu ajn doktrino formas nian menson kaj influas nian sintenon la vivmaniero ĝenerale akceptata kaj praktikata en nia ĉirkaŭaĵo. Nuntempe ni estas ĉirkaŭitaj kaj influigitaj de etoso materialisma.

Sinonimo de materialismo povas ĉi tie esti imanentismo aŭ sekularismo, kiel koncentriĝo sole je surteraj valoroj, je la portempa mondo. La proceso de sekularigo estis longtempa kaj en nia epoko ĝi dissemiĝis el Eŭropo al ĉiuj kontinentoj. Estas bone scii, ke la sekularigo estis subtenata per la Biblio kaj la Reformacio, ĉar ili multon dessanktigis, kion la homoj false respektis kiel diaĵon : naturajn fortojn, kultajn objektojn, lokojn kaj agojn. Sed la biblia kaj reformacia kredo faris tion, por rezervi la Dia tronon al Dio mem. La moderna tempo perdis tiun motivon kaj la trono restas laŭ ĝi malplena, sed fakte okupata de la enmondaj grandaĵoj. Kristana etiko estis demetita.

Ankaŭ la materialismo havas sian etikon, kiu povas listi certajn pozitivojn. Ĝi komprenas la mondon kiel realan (kontraŭ la hinduisma ŝajno - *māja*) kaj bonan (kontraŭ la greka idealismo). Ĝi ĝuas la vivon kiel pozitivan valoron. Ĝi instruas la homon mastrumi la tempon kaj la materiajn havaĵojn, eluzi vivon kiel okazon por fruktodona kaj celscia laboro. Ĝi igas lin transformi la naturon (kiu ne estas dia), sed ankaŭ respondece protekti ĝin. Ĉar la fizika vivo bezonas esti protektata de la detruo, materialistoj klopodas gardi la pacon. Serioze pripensante havigi la materiajn bezonojn al ĉiuj, ili postulas ekonomian justecon. Ĉi tie ni trovas multon akcepteblan por la kristana fido. La biblia kredo ne propagas skizofrenan dualismon, nek malestimas surteran realecon. La vivo ja estas donaco de Dio kaj kun ĝi ankaŭ la korpo, edza amo kaj sekso, la familio kaj la ĉiutaga pano. Paco kaj surtera justeco estas valoroj defendindaj !

Certe estas necese distingi. Diversaj -ismoj unuflanke akcentas iun pozitivan valoron kaj absolutigas ĝin kiel bazon de ĉio aŭ kiel





universalan rimedon kontraŭ ĉiuj malbonoj de la mondo. Tia ideologiigo estas falsa. Naturo estas pozitiva valoro, sed naturalismo estas filozofio erara. La scienco estas bona, la sciencismo kiel kredo en ĉiopovo de scienco estas malprava. La virino (latine *femina*) meritas plenan respekton, sed la feminismo estas devojigo. La paco estas benata (komprenu la biblian *ŝalom*), la pacifismo havas siajn problemojn. Same kun Esperanto. La internacia lingvo estas bona ilo por interkompreniĝo de diversnacianoj ; la esperantismo, kredanta ke Esperanto savos la homaron, estas doktrino eraríganta.

La materialisma etoso alte taksas la naturon. Kiu opinias, ke en la naturo ĉio funkcias aŭtomate, ke la naturo ĉion solvos, ke la homo estas mezuro de ĉio, tiu ne rigardas la mondon el Dia alteco, sed staras sufiĉe malalte, de kie estas nenia elrigardo. Sed la naturo ne povas savi nian homecon, kiel false supozis romantismo. La naturo dependas de Tiu, kiu kreis ĝin. Ĝi ne estas eterna, kvankam la homoj ĝin tiusence diigis. La Biblio montras la senpotencon de la naturo, se la potenca Dio deturniĝas. Se Li forprenas la vivon, ĉio mortas. La vivo dependas de la spirito, kiun Li donis. (Pre 12:7).

En la materialisma pensmaniero la homo akceptas sen kritiko la postulon, ke la ĉefafero estas la sano kaj ke tiukaŭze necesas antaŭ ĉio zorgi pri la korpo. Sian korpon la homo ne lasas malsati aŭ soifi. Regule li liveras al ĝi manĝaĵon kaj trinkaĵon. Plejparte li ne scias pri sia animo, kiu devas malsati dum jardekoj.

Se la kuracisto rekomendas, la homo kapablas limigi la nutraĵon, ne trinki alkoholaĵon, eviti seksan aktivecon, ktp., por bonfari al sia sanstato. La ideo, ke ankaŭ por la spirita sano necesas morala disciplino, superas la horizonton de la moderna nekredulo. La bibliajn malpermesojn de certaj manĝaĵoj li inklinas klarigi kiel konsilojn por sana vivkondukiĝo. Li estas preta plenumi tiajn regulojn ne el amo al Dio, sed el amo al si mem, ne el kaŭzoj spiritaj, sed sanzorgaj kaj higienaj.

Kun la kulto de sano estas ligita la kulto de la korpa forto, beleco kaj elasteco. Vidu la bildojn en ĵurnaloj, bildojn de belaj virinoj kaj sportuloj, de geaktoroj kaj gekantistoj. Adorado de sukcesaj eminentuloj ofte kompensas la seniluziiĝon de simplaj, malpli sukcesaj personoj.

La plej malalta formo de materialismo estas la kruda ĝuemeco de tiuj, kies dio estas la ventro (Fil 3:19). Sed ankaŭ la sekso: "Permesata estas ĉio, kio plaĉas." De tie disvastiĝas morala deklino : kreskanta nombro de eksedziĝoj (en grandaj urboj unu el

du geedziĝoj, en kelkaj landoj unu el tri), la multobliĝo de edza malfideleco, eĉ seksaj devojiĝoj. Aliaj el egoismaj kaŭzoj kaj nekomplezo por respondeco preferas seksan vivon sen geedziĝo (konkubecon). Ĉu la sendevigo kaj senrespondeco povas nomiĝi amo ? Nerespondeca seksa kontakto kaj ĉasado por rapida plialtigo de la vivnivelo eĉ murdas nenaskitajn infanojn. Oni povas paroli pri kaŝita amasmortigo : milionoj de nenaskitaj viktimoj akuzas ! En kelkaj grandaj urboj la nombro de la abortoj jam superas la naskiĝojn !

En la Malnova Testamento la ĉefa oponanto al la Eternulo estis Baal, diaĵo de vitala naturforto kaj de sekso. En la Nova Testamento la konkuranto de Dio nomiĝas Mamono. Sekve la MNT vidis la pezcentron de la peko en la sfero seksa, la NT en la sfero sociala. La moderna tempo adoras ne nur la ambaŭ nomitajn diojn, sed ankaŭ aliajn. La materialismo fariĝas substituaĵo de religio.

Praktika materialismo montriĝas en Okcidento ne malpli ol en Oriento, kie la filozofia materialismo estas bazo de la ŝtata ideologio. Sed en la socialismaj landoj, ne decidas unuavice la aspekto de la profito, la krimeco kaj droga dependeco estas malpli oftaj, la pornografio estas malpermesata. Grava estas ankaŭ ĉi tie la dissolvo de la familio kaj de la edza fideleco, danĝere kreskas la nombro de la eksedziĝoj kaj abortoj.

En la materialisma pensado, havas siajn rifojn kiel la sateco (Rea 8:12-14), tiel la malsato (Sen 30:8). Kiel la superfluo, tiel la manko de produktoj povas gvidi al la konsuma pensmaniero. La objektoj, kiuj devis servi, fariĝas celo de vivo. En landoj, kie la oferto superas la demandon, inventplena reklamo kuraĝigas homojn por elspezi pli ol ili laborgajnis kaj aĉeti produktojn kun ŝuldo. En landoj, kie la oferto ne sufiĉas al demando, homoj ne povas aĉeti el sia salajro la demandatajn objektojn kaj amasigas la ŝparmonon. Sed en ambaŭ kazoj ili estas kondukitaj al opinio, ke la senco de la vivo konsistas en tio, kion oni gajnas (kontraŭ Lk 12:15).

La materialisma pensado kutime estas kunigita kun la egoismo. Ekzistas diversnivelaj tipoj de egoismo, de persona formo ĝis universala egoismo de la homaro. Serĉado de materiala aŭ mona profito gvidas al tio, ke la homaro detruas la naturon, sian vivmedion.

Orientado al materiaj objektoj dividas la homojn. Ju pli unu homo posedas el ili, des malpli restas por la aliaj. De tie naskiĝas envio (pri kiu iu diris, ke ĝi estas la unusola peko, kiu donas nenian kontentigon aŭ ĝojon), sed ankaŭ konfliktoj en familio, sur laborloko, en la socio kaj inter nacioj. Egoismo kaj envio starigas unu homon kontraŭ la alia. De ĉi tie devenas la provoj ŝanĝi la





dividon de havaĵoj per ŝtelo, rabo aŭ alia formo de perforto, por ke mi kaj mia grupo ricevu pli, kompreneble kun perdo por aliaj, kiuj - laŭ mia opinio - ne bezonas tiom, kiom ili posedas. (kontraŭe la spiritaj valoroj kunigas la homojn. Ju pli iu havas da Spirito, amo, preĝoj, beno kaj donacoj de Dio, des pli utilo havas ĉiuj !).

Homa animo certe deziras valorojn pli altajn. Eble ne ekzistas pli granda sufero ol la ardanta deziro de koro, kiu estas malkontenta kaj sentas doloran malplenecon kaj senenhavon. Sed la sperto montras, ke homoj kapablas inerte forkurigi tiun soifon, nei ĝin per la dezirego por la alta vivnivelo aŭ satigi la soifon el fontoj, kiuj estas danĝeraj aŭ direkte venenaj.

Karna pensado funkcias en ĉiu homo. Por kristano ĝi devus esti pasinteco. Bedaŭrinde ĝi ne kutimas esti tia. Eĉ en la eklezio troviĝas karna pensmaniero ekz-e en formo de ĵaluzo kaj konkurado (1 Kor 3:1-4). Kie tio aperas, tie aktivas la karna pensado de la malnova homo. La eklezianoj devus per ilia vivo videble montri la novan pens- kaj viv-manieron. Ili devus elmontri, ke ekzistas ankoraŭ alia orientado kaj valorskalo, kaj ne kiel nura teorio, sed kiel praktika vivstilo. Bedaŭrinde ĝuste tiun punkton la kristanoj ofte maltrafas. Ili tro akomodiĝis al sia ĉirkaŭaĵo kaj transprenis ĝiajn sintenojn kaj normojn. Materialisma etoso penetris en iliajn korojn.

Ni vivas en apokalipsa tempo, kiam plenumiĝas la vorto de Kristo, ke

> "la maljusteco multobliĝos kaj la amo de la plimulto malvarmiĝos". (Mat 24:12)

La moderna civilizacio plene koncentriĝas sur la homa MI. Memrealigo kaj saturo de bezonoj personaj kaj kolektivaj estiĝis diaĵoj kaj anstataŭis la Dion de la Biblio. Se la hodiaŭa homo volas okupiĝi pri religio, li demandas : Kion tio alportos al mi ? Kion povas Dio fari por mi ? Kiamaniere Li faros min feliĉa, sana, trankvila, sukcesplena, riĉa ? Ĝenerala pragmatisma kaj egoisma pensado penetris ankaŭ en la religion. La devizo "la plej alta celo de homo estas lia propra feliĉo" estiĝis universala religio. Ĝi influas la kristanaron pli ol ni scias. Multaj eklezianoj nesciante adoras anstataŭ la Sinjoro Baalon aŭ Mamonon.

D-ro Robert Coleman en sia libreto "*Dry bones can live again*" (sekaj ostoj povas denove vivi) karakterizas nian epokon :

> "Dum la eklezio glitas en mezecon, la mondo engravuriĝas pli profunden en pekon. Por meztipa persono la vivo perdis sencon. Ĝi signifas manĝi, trinki kaj esti gaja ĉiu por si mem. La sankteco de hejmo kaj de familio estas forlasita.

La normoj de ĉasteco en publiko kaj privato estas senbazigitaj. La spirito de senleĝeco trapasas la landon. Sed la tago de ekkono certe venos. La morala kaj spirita deklino havas siajn limojn. Venos la tempo, kiam ni devos rikolti la stultecon de niaj vojoj. Jam ni komencas vidi la dissolvon de tradiciaj valoroj en la socio, kaj se baldaŭ ne okazos io, kio ŝanĝos nian kurson, la civilizacio, kiel ni scias, estos forpasanta."

III. Plenumado de la tasko malgraŭ la obstaklo

D-ro Coleman volas nin gvidi per sia karakterizo de la nuna epoko al ekkono pri neceso de spirita ŝanĝo kaj de reveno al la daŭraj valoroj de la kristana fido. Se la spirita kaj morala batalo en la tuta mondo en la lasta tempo ju pli fortiĝis, des pli necesas memdisciplino flanke de la kristanoj. La Eklezio de Kristo bezonas atentemajn okulojn en la antikrista mondo kun ĝiaj multaj tentoj. Ne temas pri lukto kontraŭ homoj, sed kontraŭ malbonaj spiritaj potencoj kondukantaj al peko (Efe 6:12).

La Eklezio ne povas haltigi la moralan dissolvon de la mondo per iu leĝa moralo. Moralo, kiel Walter Lüthi (*valter lüti*) predikis, kreskas ĉe ĉiu barilo, sed ĝi varmigas neniun. La Eklezio tro ofte praktikis la miraklon de Kana en Galileo (Joh 2) renverse : la vinon de la ĝoja Evangelio de Kristo ĝi ŝanĝis en akvon de la homa moralo (kiel montras diversaj modaj teologioj). Reala helpo estas nur Dia verko en Jesuo Kristo kaj en la Sankta Spirito. Nur Dio povas ŝanĝi ŝtonajn korojn en karnajn (Jeĥ 11:19 ; 36:26) kaj egoiston en personon amantan Dion kaj la proksimulon.

La savo de la mondo same ne konsistas en reveno al ĝenerala religia spiritualeco. Satano ne malhelpas, ke la homoj estu fervore religiaj, jes li ĝojas, se ili anstataŭ Dion kreas plej diversajn diaĵojn. Adorado de Kristo kaj la kultoj de homaj religioj reciproke ekskludas unu la alian (1 Kor 10:20-21).

Vivas nur tiu, kiu naskiĝis. Spirite vivi en Kristo povas nur homo naskita el la Spirito, t.e. renaskiĝinta. Validas la vorto de Jesuo :

> "Tio, kio naskiĝas el la karno, estas karno ; kaj tio, kio naskiĝas de la Spirito, estas spirito. Ne miru, ke mi diris al vi : Vi devas esti denove naskitaj". (Joh 3:6-7)

Por spirite vivi, estas necese esti enradikita en Kristo kiel la branĉoj en la vinarbo ; ĉar :

> "Sen Mi vi povas nenion fari." (Joh 15:15)

Necesas ĉiama kuniĝo kun Li.





La celo de la spirita vivo estas ne nur renkonti Dion ĉiutage, sed kiel eble iradi kun Li ĉiam simile, kiel faris la biblia Ĥanoĥ (Gen 5:22). Plene kaj senobstakle tio eblos en la ĉiela eterneco de la Dia Regno, sed al la Di-amantoj la Sankta Spirito donacas jam de nun fondobazon de tiu kunuleco kun la Patro kaj Filo Diaj (1 Joh 1:3).

La kristano estas homo, kiu estas de Jesuo Kristo elaĉetita kaj liberigita el servado al la karno kaj al la mondo, al la peko aŭ al la propra MI (kaj pere de tio al Satano). Li devas esti homo, kiu sekvas alian, novan valorskalon. Malsame kiel la imanentaj valoroj de ĉi tiu mondo aŭ epoko, ili estas valoroj nepereemaj :

> "Kaj forpasas la mondo kaj ĝia deziro, sed la plenumanto de la volo de Dio restas por eterne." (1 Joh 2:17)

La kristano lernas prave taksi la valoron de aĵoj. La videblaj estas nur portempaj, la nevideblaj estas eternaj (2 Kor 4:18). La favoro de Kristo kaj la donacoj de la Sankta Spirito estas por li realaj, kvankam dumtempe nevideblaj kaj ekkoneblaj nur per la fido. La beno de Dio estas por la kredanto pli valora kaj ĝojigas lin pli ol la riĉaj rikoltoj la aliajn homojn (Ps 4:7). La civitaneco en la Dia Regno estas por li fakto ne malpli reala ol lia aparteno al surtera hejmlando, jes ĝi estas valoro pli daŭra. Ni ja estas nur dispelitaj pasloĝantoj (1 Pet 1:1) sur la tero, sed en la domo de la ĉiela Patro ni restos eterne !

Por kristano ne estas celo de vivo la saturo de korpo, nek la memrealigo. Li servas pli altan celon, la Dian Regnon. Por tio li tenas sin en disciplino. Kontraŭ la slogano "la karno devas ricevi, kion ĝi deziras", kristano rifuzas libertinisman seksan etikon. Li ne kredas, ke eventuala abstino en seksa vivo malutilas, ke alterno de kunuloj estas afero libervola, kiel diras la domaĝa "teorio de la trinkglaso". Kristano evitas ankaŭ la incitilojn, kiujn la sekularigita ero ofertas en pornografiaj ĵurnaloj, filmoj kaj video-filmoj. La pureco de la menso kaj de la korpo volas akompani la spiritan vivon.

Kristano ankaŭ ne kliniĝas antaŭ la diaĵo Mamono (Mat 6:24). La mono ja signifas malpli ol la objektoj : ĝi estas nur surogato de ili, nura ombro. La spirita vivo kiel vivstilo alternativa inkluzivas ankaŭ la arton de modesta kontentiĝo kun malmulto, de memvola abstino de io pro la bono de la proksimuloj. Sed tamen la vivo celanta al la Dia Regno ne estas malpli, sed pli riĉa ol la vivo en superfluo de teraj havaĵoj.

La rimedo kontraŭ la koncentriĝo nur sur videblaĵoj estas la fido kiel pruvo de aĵoj nevideblaj (Heb 11:1), kiu venkas la

mondon (1 Joh 5:4). La limiĝon de la menso al la portempaj aferoj ni povas venki per la espero de la eterno. Kaj nenio tiel baras la egoismon de la propra MI kiel la amo, kiu forpelas timon pri si mem (1 Joh 4:14) kaj kiu estas la plej alta esprimo de la Spirito en nia vivo (1 Kor 13:13).

La fido ne forgesas, ke ĉio surtera estas nur parto de la Di-kreita realeco. Ĝi serĉas la pli altan vojon kaj celas al la Spirita vivo, al la vivo kun Kristo en la Spirito (kp. Kol 3:4). "Via favoro estas pli bona ol la vino," preĝas la psalmisto (63:3). La nov-testamenta ζωη (*zōē*, vivo) ne estas la sama kiel βιος (*bíos*), simile kiel αγαπη (*agapē*, amo) ne egalas ερως (*erōs*), sed transcendas ĝin. La fido kalkulas ankaŭ kun aĵoj nevideblaj (Heb 11:1) kaj per tio ĝi aldonas novan dimension al nia vido.

La solvo de la ekstrema konsuma pensmaniero de satuloj kaj malsatuloj estas la meza vojo, kontenta kun tio, kion ni posedas (Fil 4:12 ; 1 Tim 6:6). La solvo estas unue celi la Dian Regnon kaj Lian justecon kaj ĉion akcepti kiel aldonitan de Dio (Mat 6:33).

**KONKLUDO**

Jam la unuaj kristanoj estis endanĝerigitaj de la dekadenca moralo de sia ĉirkaŭaĵo. Ili ne starigis kontraŭ tio novajn etikajn regulojn. Ili akceptis kiel devigajn la Diajn ordoncjn el la Malnova Testamento, sed ne komprenis ilin jure. Ili ekkonis, ke la plej grava afero en la Leĝo estas la amo al Dio kaj al la proksimulo, kaj en unuopaj aferoj ili lasis sin gvidi per la Spirito en la libereco de la Diaj infanoj. "Amu kaj faru kion vi volas", sumigis tiun principon Augustinus (Aŭgusteno). Paŭlo fortigis la novajn kristanojn kaj la lokajn eklezioj rememorante al ili la savajn agojn de Dio, en kiuj ili ankaŭ partoprenis : "vi laviĝis, vi sanktiĝis", nome per la bapto kaj la Sankta Spirito. Kristo transportis ilin en tute novan ekzistad-formon : "vi justiĝis" (1 Kor 6:11).

Meze en la mondo kun ĝiaj pozitivoj kaj negativoj, kun ĝia moralo kaj malmoralo, kun ĝiaj kutimoj kaj fikutimoj, vivas kaj laboras kristanoj kiel homoj de Kristo. Ili ne devas simple flosi en la kurento. Kristo liberigis ilin de la "malnova fermento". Ĉiu falo reen estus neniigo de ilia nova ekzisto.

Ankaŭ en la hodiaŭa tempo de materialisma etoso tamen ekzistas kristanoj vivantaj el alia fonto. En la tuta mondo ili estas frontataj kun la demando, kiamaniere ili atestu la kristanan ekziston en medio alimaniere pensanta, kiel vivi spirite meze de la materialisma etoso. Povus ŝajni, ke en landoj tute sekularigitaj estas tio pli malfacila, ĉar en seka tero oni devas fosi pli profunden por





trovi kaŝitan akvofonton. Sed la spirita vivo ne dependas de nia klopodo. Ĝi estas donaco de Dio, kiu emas disdoni gracon tie, kie la mizero estas plej granda, ankaŭ la spirita kaj morala mizero.

Estas vero : unuopa persono malfacile sukcesos en medio alimaniere pensanta, se li aŭ ŝi ne volas elekti eksteran ermitaĵon aŭ internan izolecon. Kristano ne devas izoliĝi. Lia Sinjoro komisiis al li sendadon plenumendan kaj mesaĝon transdonendan al aliaj. Sed por konservi sin nemakulita de la mondo (Jak 1:27) li bezonas kununlecon kun la Sinjoro kaj kun la gefratoj.

Ni ĉiuj facile devojiĝas kaj devas lukti kontraŭ la propra malforteco. La Sankta Spirito donas al ni la necesan spiritan armilaron : la zonon de vero, la kirason de justeco, la ŝuojn de atestado de la Evangelio, la ŝildon de fido, la kaskon de savo, la spiritan glavon de la Dia vorto, la preĝon (Efe 6:14-18).

Por la kristana batalo de la fido (1 Tim 6:12) ni gajnas forton per la spirita ekzercado : per la fervora preĝo en la Sankta Spirito por la helpo de Dio, per la diligenta studado de la Skribo, per la energia klopodo servi al Li per niaj vorto kaj ago. La partopreno en la Diservo fortigas por la spirita kaj morala lukto kontraŭ la fortoj de la tento kaj de la peko. Temas pri tio, ke la "malnova homo en mi" (la egoisma MI) estu mortigata kaj ke Jesuo Kristo gajnu aspekton en ni tiel, ke ni povu diri kun la apostolo Paŭlo :

"Jam ne mi mem, sed Kristo vivas en mi" (Gal 2:20).

Ni demandu : Ĉu ni jam estas spiritaj aŭ nur karnaj homoj ? Estas grava manko, se la spirita penso estas malmulte ekkonebla ĉe ni. Ni devas reveni al la konvinko de la Biblio kaj de la Reformacio, ke la plej nobla tasko de homo estas glori Dion. Ni do lernu konfidi al la Sankta Spirito, ke Li volas labori sur ni. Tiuj, kiuj fidas la Eternulon, ricevas novan forton : ili levas la flugilojn kiel agloj (Jes 40:31). La aglo fluganta en alteco ne zorgas, kiamaniere li transiros la riveron.

Cyril Horák, Ĉeĥoslovakujo

Cyril HORÁK, ĉeĥoslovako (1930). Li studis evangelikan teologion en la fakultato de Comenius en Praha (1949-1953), fariĝis doktoro pri teologio en 1984. Pastoro de la Ĉeĥfrata evangelika eklezio. Membro de la teologia komisiono de la Monda Evangelika Alianco (W.E.F., A.E.U.), i.a. Partoprenis en diversaj KELI-kongresoj, en evangelizaj konferencoj (i.a. Amsterdam 1983, Singapore 1986). Edzo kaj patro de tri infanoj.

## V O Ĉ O J   K R I S T A N A J

serieto celanta aŭdigi la plej diversajn voĉojn
de kristanismo:
de liberala ĝis ortodoksa
de rom-katolika ĝis protestanta
sendepende de dogmaj limigoj
depost Prakristanismo ĝis la nuno
intern-eklezie, ekumene, interreligie kaj tuthomare

aperis ĝis nun nur kelkaj numeroj. ĉiu estas plene memstara. kiu havas ion seriozan por prezenti, sciigu tion al ni. kiu volas subteni nian entreprenon, ĉu per donaco ĉu per prunto ĉu alimaniere, sciigu tion al ni.
diskonigu niajn eldonaĵojn! diskonigu niajn eldonaĵojn!

Jam aperis:

1: <u>La Evangelio laŭ Petro & La Morto de Jesuo kaj kio poste?</u> apokrifa evangelio k eseo originala. 12 paĝ. 1,80 guld.

2: Tertuliano - <u>Apologio</u> (el la jaro 197 p.Kr) gravega latina verko el la frua eklezio. trad. Gerrit Berveling. 116 p. 9,90 guld.

3: <u>Sin-konservo</u> eseoj k predikoj pri kristanismo k nukleaj armiloj. 52 p. 6,30 guld.

4: <u>Al Diogneto</u>. apologieto el la komenco de la 2a jc. el la helena trad. Isai Sumber. 16 p. 1,80 guld.

ĉiuj ĉi tiuj en dua eldono

5: Kenneth Twinn - <u>Unitariismo; skizo pri la kredoj historio k organizo de la religiuloj nomitaj Unitarianoj</u>. la aŭtoro estas unitaria pastro. 24 p. 1,80 guld.

7: Gerrit Berveling - <u>Dio/Kristanismo/Aliaj Religioj</u>. studaĵo pri 'teologio de la religioj'. 36 p. 4,20 guld.

8: <u>La Evangelio laŭ Maria Magdalena</u>. prelego k traduko de la restantaj fragmentoj de apokrifa evangelio. grava pro la rolo de virinoj en la frua kristanismo. 12 p. 1,80 guld.

9: <u>Jam Temp' Está!; la "Kairos-dokumento" de Sudafrikaj kristanoj</u>. kontraŭ ras-apartigo. 32 p. 4,20 guld.

10: <u>Beatrijs</u>: mezepoka romkatolika Maria-legendo. el la nederlanda. 24 p. 3 guld.

11: Isai Sumber - <u>Kie oni trovas tion en la Korano?</u> malgranda konkordanco. 32 p. 4,20 guld.

12: Tertuliano - <u>Kuraĝigo por la Martiroj</u>. por edifo de estontaj martiroj en Kartago, ĉ. 197 p.Kr. el la latina. 12 p. 1,80 guld.

13: <u>Kantu al la Eternulo</u>. kantaro de (ĉefe ĉeĥaj) kristanoj. trad. el diversaj lingvoj de Jiři Kořínek k.a. 44 p. 6 guld. 2a eld.

14: M.de Goeij - <u>La virino en la Judismo</u>. el la nederlanda. 48 p. 6 guld.

15: <u>SEKECI POETAS</u>; poemoj el la K.E.L.I.-rondo. komuna eldono de K.E.L.I. kaj VoKo. por honori la 100-jariĝon de Esperanto. 48 p. 6 guld.

krome prepariĝas verkoj
(i.a.) pri samseksemo k Kristanismo
pri arta fekundigo k moralo
prakristanaj kantoj en traduko
ekzegeza komentaro pri JONA

k.m.a.

eld. VoKo
Coornhertstraat 50
3132 GK VLAARDINGEN
NEDERLANDO



## SPIRITA VIVO ĈE MENSAJ HANDIKAPULOJ

**Kian bildon vi havas pri mensaj handikapuloj ? Ĉu aparta grupo de homoj, kun strangaj vizaĝoj, sen la kapablo fari ion por si mem ? Sed pensu momente... Ĉu vere oni povas apartigi la homaron en du grupojn, la mense handikapitaj kaj la "normalaj" ? Komprenеble ne ! Ekzistas kontinueco inter la mense plej kapabla homo, kaj la mense plej handikapita homo, do ia apartigo devas esti nur arbitra.**

**Do la du vortoj mensaj handikapuloj povas indiki multajn diversajn homtipojn. Ekzemple : infano kiu povas bone paroli, bone piediri, ktp., sed samtempe kiu lernas malpli rapide ol siaj samaĝuloj ; virino kiu kapablas desegni belegajn bildojn, sed ne povas konversacii, eĉ simple, kun alia homo ; knabo 11-jara, kiu (pro tre malgranda menspovo) agas kiel bebo, ne parolas, ne povas teni la kapon rekte, povas reteni nek sian urinon nek sian fekon. Mi povus aldoni aliajn malsamajn ekzemplojn. Do oni ne povas trakti la "mensajn handikapulojn" kiel homogenan grupon, ĉar tio ili certe ne estas.**

**Espereble mi supre forviŝis la falsan ideon, ke mensaj handikapuloj estas ĉiuj samaj. Sed nun, por bone trakti mian temon, mi devas demandi : Kio estas spirita vivo ? Ĉu homo devas kredi aŭ fari tion kaj tion por akiri tiun "spiritan vivon" ? Ĉu tiuj estas gravaj demandoj, kaj ne nur en la fako de mensa handikapo. Por respondi tiajn demandojn, ni devas turni nin al la Biblio. Kion diras la Vorto de Dio pri spirita vivo ? Pli bone ni unue demandu : Kion diras la Vorto de Dio pri spirita morto ?**

> **"Kaj vin Li (Jesuo) vivigis, kiam vi estis malvivaj per eraroj kaj pekoj, en kiuj vi iam iradis laŭ la vojo de ĉi tiu mondo, laŭ la estro de la potenco de la aero, de la spirito, kiu nun energias en la filoj de malobeo, inter kiuj ni ĉiuj iam ankaŭ vivis, plenumante la dezirojn de nia karno, farante la volojn de la karno kaj de la menso, kaj ni estis laŭ naturo infanoj de kolerego, kiel ankaŭ la aliaj." (Efe 2:1-3)**

**Kiel do ĉi tiuj efesanaj kristanoj akiris spiritan vivon ? Kiel iu ajn povas akiri tian vivon ? Ĉar, laŭ la Biblio :**

> **"Ne ekzistas diferencigo ; ĉar ĉiuj pekis kaj maltrafis la gloron de Dio." (Rom 3:22-23)**

**Nur per la mirinda graco de Dio ! Kion do pri fido ? Ĉu oni ne devas fidi ? Jesege ja ! Tamen, kiel homo malviva pro eraroj kaj**

pekoj kapablas fidi (aŭ fari iun ajn spiritan agon) ? Ĉu riĉa aŭ malriĉa, ĉu reĝo aŭ stratbubo, ĉu sana aŭ malsana, ĉu mense handikapita aŭ lertega, neniu en si mem havas la povon fidi.

> "Ni ĉiuj bezonas rigardi malantaŭ la pli evidentaj mal-kapabloj, kaj la problemojn, kiujn ili rekte kaŭzas. Ĉar malantaŭ la handikapoj de kelkaj kaj la ŝajna bonfarto de aliaj estas la handikapo, kiun ni ĉiuj suferas, nia foreco de Dio, la Kreinto, Vivdonanto kaj Vivsubtenanto."[1]

Mi supre citis la unuajn tri versiklojn de Efesanoj 2, pri spirita morto. Tuj sekvas du vortetoj, plenegaj de signifo : Sed Dio. Glorindaj vortoj ! Jen tiuj homoj en Efeso, spirite mortaj per pekoj kaj eraroj. Kion ili kapablas fari, en tiu stato, por akiri spiritan vivon ? Preĝi ? Kredi ? Adori Dion ? Neniel ili kapablas agi tiumaniere, ĉar tiuj estas spiritaj agoj, kaj tiuj homoj estas spirite mortaj. Spirite mortaj homoj ne povas fari ion spirite, same kiel fizike mortaj homoj ne povas fari ion fizike.

Sed Dio ! Sed Dio... kion ?

> "Sed Dio, estante riĉa en kompateco, pro Sia granda amo, per kiu Li amis nin, eĉ kiam ni estis malvivaj en niaj eraroj, nin vivigis en Kristo (per graco vi saviĝis)." (Efe 2:4-5)

Do, spirita vivo komenciĝas, ne ĉe homo, sed ĉe Dio. Humiliga penso, ĉu ne ? Neniu kristano rajtas alpreni iun meriton pri sia stato ; eĉ fido mem estas donaco de Dio.

> "Per graco vi saviĝis per fido, ne per vi mem ; ĝi estas dono de Dio." (Efe 2:8)

Sed kial mi ankoraŭ ne traktis pli precize la temon Spirita vivo ĉe mensaj handikapuloj ? Simple tial : Se ni agnoskas la fakton, ke la Ĉiopovanta Dio mem estas la donanto de spirita vivo, ni devas ankaŭ agnoski, ke iaj problemoj pri mensaj handikapuloj kaj spirita vivo ekzistas nur en niaj mensoj.

Skribinte tion, mi devas cedi, ke ekzistas du flankproblemoj. Unue, kiel ni povas rekoni spiritan vivon ĉe mensaj handikapuloj ? Kiam temas pri mildaj handikapoj, la problemo ne estas tro granda - almenaŭ ĝi ne estas multe pligranda ol ĉe normalaj homoj. La homo kun milda handikapo povas paroli pri sia amo por la Sinjoro Jesuo Kristo, povas montri per sia vivmaniero kaj per sia amo al aliaj kristanoj, ke li posedas spiritan vivon en Kristo. Tamen, kion pri la severe handikapitaj ? Ofte ili ne posedas parolpovon, kaj eble povas komuniki la plej simplajn emociojn kaj bezonojn per ridetoj,





vizaĝesprimoj, krioj, ktp. Kiel oni povas rekoni spiritan vivon ĉe tia homo ? Mi vere ne scias. Tamen, mi estas certa, ke Dio kapablas doni spiritan vivon al tiaj homoj, kaj mi fidas, ke Li ĉiam agas juste, kion ajn Li faras.

La alia flankproblemo estas : Kiel oni povas evangelizi mense handikapitajn homojn ? (Kiam ajn ni alfrontas problemojn pri evangelizo, necesas memori, ke nia tasko kiel kristanoj estas prediki la Evangelion, ĉu per vortoj, ĉu per nia vivmaniero. La sukceso dependas de Dio mem.)

La problemo ne estas tro granda ĉe tiuj, kies mensa handikapo estas nur milda. Tamen, kiel ni povas evangelizi la plej severe handikapitajn ? Mi ne povas doni al vi simplan respondon ; mi nur povas proponi, ke ni tenu en la menso du pensojn tiurilate.

Unue, ni ne vere scias kiom la mensoj de la severe mense handi-kapitoj povas akcepti. Ni kutime mezuras nivelon de akcepto en la menson per ia reago ĉe la akceptanto. Ekz-e, se mi deziras scii, ĉu aŭ ne normala homo komprenas ion, mi povas fari demandojn, kaj aŭskulti la respondojn, aŭ mi povas observi reagojn al instrukcioj, ktp. Ĉe la plej handikapitaj, ĉi tiuj signoj de kompreno ne estas evidentaj. Nu, kiam temas pri spirita vivo, la kutimaj signoj de disĉipliĝo (ekz-e amo al aliaj kristanoj, ŝanĝita vivmaniero, parola atesto pri savo) ne povas aperi.

Due, memoru ke la Evangelio ne estas akceptebla al la natura homo (ĉu handikapita aŭ ne).

> "Sed la natura homo ne akceptas la aferojn de la Spirito de Dio ; ĉar ili estas por li malsaĝecd." (1 Kor 2:14)

Tial, kristanoj devas demandi sin : "Kial ni evangelizas, se la natura homo ne povas akcepti la Evaneglion ?" Sed la respondo estas jam donita pli frue en ĉi tiu artikolo, kaj (multe pli grave) en la Biblio (Efe 2). Spirita vivo estas donaco de Dio. Kial Li ne simple disdonas tiun donacon ? Ĉar ne plaĉis al Li agi tiel !

> "... bonvolis Dio per la malsaĝeco de la prediko savi la kredantojn." (1 Kor 1:21)

Evidente, al kiu ajn ni predikas (ĉu al mense handikapitaj, ĉu al aliaj homoj), ni havas problemon de eniro. Nur Dio mem povas enirigi la predikitan Evangelion. Tion dirite, estas certe, ke la flankproblemo pri kiel evangelizi mense handikapitajn homojn preskaŭ malaperas. Kompreneble, taŭgas uzi lingvon, kiel eble plej simplan (eble gestlingvon), sed finfine nur Dio havas la kapablon

savi.

Ĉu mi taŭge kaj sufiĉe traktis mian temon ? Preskaŭ certe ne ! Sed ni havas grandan, potencan Dion, kaj Li faras kion ajn Li deziras. Per Jesaja la profeto, Li diras :

"(Mia Vorto) ne revenos al Mi vane, sed plenumos Mian volon, kaj sukcesos en tio, por kio Mi ĝin sendis." (Jes 55:11)

Kaj al Moseo Li diris :

"Mi favorkoros tiun, kiun Mi favorkoros, kaj Mi kompatos tiun, kiun Mi kompatos." (El 33:19)

Savo, kristaniĝo, disĉipliĝo estas tute per graco de komenco ĝis fino, kaj la graco de Dio taŭgas por la handikapulo same kiel por la normala homo.

David J. Lamb, Britujo

noto

1) WINTON (Ronald). - *Real man through God's grace.* el *God and the handicapped child* (Dio kaj la handikapitaj infanoj), elektitaj referatoj de Internacia Konferenco de Kristanaj Kuracistoj, 1981. - London : Christian Medical Fellowship. - ISBN 0 906747 07 4. p. 50.

David J. LAMB *(dejvid lemb)*, brito (anglo) (1949). Li estis membro de la anglikana eklezio, konvertiĝis kaj aliĝis al reformita baptista eklezio. Li laboris kiel instruisto pri muziko. De 1975 li estas instruisto en speciala lernejo por profunde mensaj handikapuloj. Li edziĝis en 1985.





# ERIC LIDDELL - MUSKOLA KAJ SPIRITA VIVO

Antaŭ 64 jaroj, vendredon la 11-an de julio 1924, la posttagmezo estis treege varma. Tie kaj tiam Eric Henry Liddell, kiu gajnis por si la epiteton la fluganta skoto, venkis en la 400-metra konkurso dum la tiujaraj Olimpiaj Ludoj, kaj ne nur venkis, sed ankaŭ establis mondan rekordon por tiu konkurso.

Li gajnis oran medalon, sed tiel ankaŭ faris aliaj partoprenantoj en aliaj konkursoj, kelkaj gajnantaj du, tri, kaj eĉ kvar medalojn. Sed estas la nomo de Eric Liddell kiu elstaras el tiuj Ludoj kaj el tiu erao kaj kiu estas la preskaŭ tuja respondo de ĉiu al iu demando pri famkonata atleto en la historio de sporto.

Tio, kio kontribuis al la famo de Eric Liddell estas ne nur, ke li venkis en tiu aparta konkurso, sed ke li ne partoprenis alian konkurson, la 100-metran, ĉar li rifuzis konkursi dimanĉe.

La atleta mondo favoris lin sukcesi kiel 100-metra konkursanto sed li fordonis la oportunon gajni oran medalon en ĝi, ĉar principo de lia kristana fido pli gravis al li ol iu alia konsideraĵo. Kompreneble, kiam li neatendite venkis en la 400-metra, Skotlando kaj ja tuta Britujo eksplodis en entuziasman aplaŭdon. La tuta lando laŭdis kaj preskaŭ adoris lin, kaj kiam, la sekvantan jaron, li forlasis Skotlandon por iri al Ĉinujo servi Dion kiel misiisto, la publiko, kaj ne nur la kristana publiko, adiaŭis lin laŭ maniero, kiu tute malsimilis iun antaŭan aŭ postan alsendadon. Kiam li mortis en japana internigejo en 1945, kvankam li estis for de Britujo, preskaŭ seninterrompe dum dudek jaroj, la publika malĝojo estis intensa. La tuta lando funebris.

Eric estis la dua filo en la familio de James kaj Mary Liddell, kiuj iris al Ĉinujo kiel misiistoj de la *London Missionary Society* (Londona Misia Societo), James en 1898, Mary en 1899, dum kiu jaro ili geedziĝis. Komencante deĵori en Mongolio, post nur kelke da monatoj ili estis devigataj forflugi pro zorgo pri siaj vivoj rezulte de la revolucio de la *Boxers* en norda Ĉinujo. Ili alvenis en Shanghai (Ŝanhajo), kie Mary naskis sian unuan filon Robert Victor. Post iom da tempo oni aranĝis, ke Mary restu en la kompara sekureco de misiejo en Tjanjin (Tjanĝin aŭ Tientsin), dum James ekreiris al Mongolio por rekomenci la tiean laboron, kaj por eltrovi kiel fartis la ĉina kristana komunumo, kiun li bedaŭrinde devis forlasi. James do revenis al sia antaŭa misiejo en Mongolio,

forestis dum multe da monatoj dum kiu tempo Mary malofte ricevis novaĵojn de aŭ pri li, sed timeme aŭdis raportojn pri ribeloj kaj mortigoj. Dum tiu periodo la dua filo Eric Henry naskiĝis la 16-an de januaro 1902. Pro multe da malfacilaĵoj James ne povis rekomenci la laboron en Mongolio. do la Societo rekomisiis lin al nova posteno en la vilaĝo Xiaocheng (Ŝjaŭĉeng aŭ Siaocheng).

Tia estis la Ĉinujo en kiun naskiĝis Eric, Ĉinujo ŝirita kaj ĝenita de eksterlanda kaj enlanda intrudo kaj revolucio. Ŝajnas, ke estis la sama Ĉinujo en kiu li ankaŭ mortos post kvardek jaroj, mem kiel misiisto en lando okupita de japanaj invadintoj.

Kiam estis oportune Mary prenis siajn du filojn, forlasis Tjanjin-on kaj vojaĝis por rekuniĝi al James la patro en Xiaoĉeng. Ĉi tie en 1903, tria infano, filino Jenny, alvenis post kiam por pluaj kvar jaroj James kaj Mary kontente kaj feliĉe laboris.

En 1907 post naŭ jaroj en Ĉinujo, naŭ jaroj de diversaj sortoj kaj spertoj, iuj timigaj, iuj malfacilaj, James kaj Mary ricevis forpermeson de la Societo kaj revenis kun la familio al Skotlando. Eric nun estis kvinjara. Li ne plu vidos Xiaoĉeng-on ĝis en 1937 li mem kiel misiisto eklaboros kun sia pli aĝa frato Robert.

Kiam la gepatroj revenis al Ĉinujo en 1908, ili forlasis la du knabojn en Anglujo en la Lernejo por la Filoj de Misiistoj (nun nomita *Eltham College*), kaj tiel komenciĝis longa periodo de disiĝado por Robert kaj Eric, sorto kiu en tiu tempo estis ofta por la misiistaj familioj.

La eduka etoso de tiuj tagoj forte inkluzivis emojn al vireco kaj patriotismo, al kuraĝo kaj forteco, la atingon de tiuj multe helpis ne nur la disciplino de lernado kaj studado, sed ankaŭ la partoprenado en ludoj kaj sportoj. Eric kompetente sed ne elstare progresis tra la akademia programo de la lernejo, sed je la sporta flanko li brilis. Lia fratino Jenny (post multe da jaroj) memoris ke li diras al ŝi, "mi ne multe taksas lecionojn, sed mi povas kuri." Ne nur tio, li ankaŭ tre bone kaj facile sukcesis en ludoj kiel rugbeo kaj kriketo. Robert egale sukcesis sur la sporta kampo kaj estas interese rimarki, ke en 1918 la rezultoj de la kolegiaj atletaj eventoj estas la jenaj :

| | | |
|---|---|---|
| trans-kampara konkurso | 1. R.V. Liddell | 2. E.H. Liddell |
| longa salto | 1. E.H. Liddell | 2. R.V. Liddell |
| alta salto | 1. R.V. Liddell | 2. E.H. Liddell |
| 100-jarda konkurso | 1. E.H. Liddell | 2. R.V. Liddell |
| barila konkurso | 1. R.V. Liddell | 2. E.H. Liddell |
| kvaron-mejla konkurso | 1. E.H. Liddell | 2. R.V. Liddell |





En 1918 la kolegia sporta ĉampiono estis Robert kaj en 1919 estis la vico de Eric, kiu tiam establis kolegian rekordon por la 100-jarda de 10,2 sekundoj, kiu ĝis hodiaŭ restas.

Eric forlasis Eltham College-on en 1920, en kiu jaro li matrikuliĝis en la universitato de Edinburgh (Edinburgo), kie li intencis studi dum kvar jaroj por diplomo en scienco, precipe studante kemion kaj matematikon. Li montris sin kapabla studento ĉiam gajnanta bonajn rezultojn en siaj klas-ekzamenoj.

Eric ne serioze intencis daŭrigi sian sportan agadon, sed post nur du-tri monatoj en la universitato, aliaj aŭdis pri lia atleta lerteco kaj provis persvadi lin partopreni la universitatajn konkursojn. Unue li rifuzis - "Mi estas tro okupata. Mi devas multe studi, do mankas al mi la tempo por tiaj bagatelaĵoj" - tamen poste li troviĝis inter tiuj kiuj pretigas sin por la atletaj eventoj.

En la historio de la atleta klubo de la edinburga universitato, iu samtempulo de Eric priskribas :

> "La fina sabato de majo alvenis kaj ni estis preskaŭ pretaj por la prepar-konkursoj. Apud mi maldekstre estis Liddell vestita en longa nigra pantalono kaj blanka ĉemizo. Ni bone startis kaj baldaŭ evidentiĝis ke mi devos strebi por mia sukceso, ĉar Liddell kuris tre apude malantaŭ mi. Mi frontis la fin-linion nur unu-du colojn antaŭ li. En la fina konkurso por la 100-jarda la malo okazis, Liddell frapis la fin-linion nur unu-du colojn antaŭ mi en tempo de 10,4 sekundoj. Mia memtaksado poste ricevis duan ŝokon en la 220-jarda konkurso, kiun mi opiniis esti mia plej bona distanco. Liddell bone startis kaj baldaŭ kreis intervalon de du jardoj kiun mi malpliigis al unu kaj finfine venkis lin. Sed post tio mi konsciis, ke nova stelo alvenis sur la skota atleta scenejo."

Eric Liddell, la nekonata "freŝulo" ja alvenis. Lia malvenko en tiu 220-jarda konkurso estis la sola fojo, ke li malvenkis en Skotlando.

Tiel li daŭris ĉiam venkanta en ĉiu sporta evento en kiu li partoprenis, ĝenerale la 100-, 220-, kaj 440-jardaj, ofte kreinta novajn rekordojn - efektive en 1923 tempo de 50,2 sekundoj por 440-jarda konkurso restis skota universitata rekordo ĝis 1957.

Pli grava, tamen, ol la studado kaj la konkursado estis la kristaneco de Eric. Ĉar liaj gepatroj estis kristanoj, ĉar liaj lernejaj jaroj pasiĝis en kristana kolegio, ne estas surprizo, ke

frue en sia vivo li dediĉis sian vivon al la Savinto Jesuo Kristo, pli kaj pli poste konfesante sian fidon en privataj rondoj kaj en publikaj kunvenoj. Kiel studento li partoprenis la kunvenojn de la Universitata Evangelika Unuiĝo kaj akceptis invitojn paroli dum evangelizaj kampanjoj en centra Skotlando.

Estas neniu raporto, ke Eric iam esprimis dubojn. Ne ĝenis lin la intelektaj demandoj, kiuj tiom eniras la mensojn de la moderna kredanto. Se li spertis dubojn, li neniam parolis pri ili. Li certe kelkfoje malkuraĝiĝis, sed ĝenerale lia simpla persona fido neniam ŝanceliĝis dum sia tuta vivo. Lia sinteno korespondis kun tiu de evangelika kaj misiista vidpunkto.

La radikoj de lia fido estis firmaj en la evangelika fundamentista tradicio, kiu akceptas la Biblion kiel la enkorpiĝon de la vereco pri la homaro, pri ĝia sorto, pri ĝia interrilato kun Dio la Kreinto. La principo de la observado de la dimanĉo - la tago de la Sinjoro - kiel tago por ripozo kaj adorado, tiu principo kiu baldaŭ ĵetos Eric-on al internacia elstaro, naskiĝis el tiuj kredoj. Kiel la juna riĉulo en la Nova Testamento "tiajn aferojn li sciis kaj akceptis de sia junaĝo" (Mat 19:20) kaj ne estis lia naturo dubi kaj demandi.

Li aŭskultis, li legis, li akceptis kaj pro tio lia fido firmiĝis en lia memoro kaj personeco, tiom ke en postaj jaroj multe da samtempuloj raportis ke ili vidis Kriston en li. Se iam homo elmontris al aliaj la gracon, la amon, la kompaton de la Sinjoro Jesuo Kristo, estis Eric Liddell.

Tiu studenta religia agado estis la komenco de vivo dediĉita al la servo de Dio. Oni diris, ke li ne estas elokventa oratoro, ne estara predikanto, sed tamen la homoj aŭskultis lin kaj konvinkiĝis pri la forto de lia fido kaj de la realeco de lia sincereco. Li elmontris forton - enaniman forton - kiun homoj ne povis ignori kaj efektive la personeco ofte pli ekbrilis kaj influis ol la vortoj de liaj lipoj.

En la jaro antaŭ la Olimpiaj Ludoj (1923), multe da spekulado ekzistis pri la elekto de la kurantoj, kiuj reprezentos Britujon. Ĝis tiam Eric Liddell estis skota fenomeno, neniam partopreninte atletan eventon en Anglujo ĝis en julio de tiu jaro kiam en la Stamford Bridge stadiono en London, la angla ĉefurbo, kiel homo inspirita li sukcesis en la 220-jarda en 21,6 sekundoj kaj kreis novan britan rekordon de 9,7 sekundoj en la 100-jarda, rekordon kiun oni ne superis dum la postaj 35 jaroj. Post unu semajno en kontesto inter la universitatoj de Anglujo, Skotlando kaj Irlando, li venkis en la tri ĉefaj konkursoj, la 100-jarda, la 220-jarda,





kaj la 440-jarda. Kio estis rimarkinda pri la lasta estas, ke pro kolizio kun alia li stumblis tiel perdanta un-du sekundojn, hezitis sed finfine decidis daŭrigi la provon venki. Per surpriza rapideco li antaŭen saltis kaj postkuris siajn rivalojn, sukcesante malpliigi la distancon inter si kaj ili. Finfine per preskaŭ superhoma peno li frontis la finlinion la unua. Laŭ skota ĵurnala raporto :

> "La cirkonstancoj en kiuj li venkis faris ĝin preskaŭ mirakla ago. Veteranoj de la sporta mondo unuanime opiniis tiun venkon en la kvaronmejla la plej mirinda trak-agado kiun ili iam ajn vidis."

Laŭ legendo, iu kiu petis la sekreton de lia sukceso ricevis la respondon :

> "Dum la unua duono mi kuras tiel eble plej rapide, kaj dum la dua duono mi eĉ pli rapide kuras kun la helpo de Dio."

Kontraŭe, aliaj aŭdis lin modeste diri nur ke ne plaĉas al li esti venkita.

Post tiuj sukcesoj estis neniu dubo pri lia elekto por la venontaj Ludoj. Oni decidis, ke li pretigu sin por la sprintaj eventoj, la 100-metra kaj 200-metra, precipe por la 100-metra pri kiu li superis kaj de kiu li estis la brita ĉampiono.

Frue en 1924 oni anoncis la plan-tabelon por la Ludoj kaj kiam Eric eltrovis ke la 100-metra konkurso okazos dimanĉe, li anoncis : "Mi ne povas partopreni". ; simpla decido kontraŭ kiu por li estis nenia argumento. La instancoj konsterniĝis ĉar Eric estis je la pinto de sia kapableco. Li estis ilia ĉefa "esperplenulo" ; sukceso en tiu evento por Britujo estis garantiata pro la partoprenado de Eric. Kvazaŭ okazis la forĵetado de ora medalo.

Riverenco por la Sankta dimanĉo, la kristana *Ŝabat*, estis parto de la animo kaj menso de Eric Liddell kontraŭ kiu neniu povis iel ajn persvadi lin. Ne estas konate ĉu li ŝanceliĝis inter decido je religiaj principoj kaj decido je nacia honoro. Se jes li neniam parolis pri la dilemo. Ĵurnala kritikado kaj publika alvoko al patriotismo ne persvadis lin ŝanĝi lian intencon, sed ili vundis kaj malfeliĉigis lin, precipe kiam oni nomis lin "perfidulo".

Finfine la instancoj akceptis lian decidon kaj subtenis siajn esperojn sur alia elektito por la 100-metra konkurso. Intertempe Eric decidis ke li konkursos en la 400-metra por kiu li nun komencis pretigi sin. Lia tempo por tiu evento estis 49,6 sekundoj sed aliaj internaciaj konkursantoj povis fari ĝin en 48 sekundoj, do liajn esperojn por sukceso en tiu evento la publiko kaj instancoj ne alte taksis.

Venis la Olimpiaj Ludoj, kaj venis la tago de la 100-metra konkurso, sed kie estis Eric ? Kvankam jam en Paris oni trovas lin tiun dimanĉon en la skota preĝejo en la franca ĉefurbo, kie oni invitis lin gvidi la Diservon. Pri kio li predikis ? Eble :

> "Ĉu vi ne scias, ĉu vi ne aŭdis, ke la Eternulo estas Dio eterna, la Kreinto de la finoj de la tero ? Li ne laciĝas kaj ne senfortiĝas ; Lia saĝeco estas neesplorebla. Li donas forton al la laculo, kaj al la senfortulo Li plifortigas la povon. Knaboj senfortiĝas kaj laciĝas, junuloj ofte falas ; sed tiuj, kiuj fidas la Eternulon, ricevas novan forton, ili levas la flugilojn kiel aglo, ili kuras kaj ne laciĝas, ili iras kaj ne senfortiĝas." (Jes 40:28-31)

Dum la Ludoj mem ekscito pri Eric Liddell malpliiĝis kaj preskaŭ malaperis. Oni notis ke li partoprenis la 200-metran konkurson merkredon kaj venis la tria en la fina konkurso. Ke Eric gajnis bronzan medalon por Britujo je sia unua olimpia apero kaj ke li estis la unua skoto iam gajnanta olimpian medalon ne estis io fanfaroninda.

Ĵaudon li partoprenis la provkonkursojn por la 400-metra en mezbona tempo de 50,2 sekundoj. Poste la saman tagon li faris la kvaronprovon en 49,0 sekundoj. La postan tagon en la duonlasta provo li venkis kun la tempo de 48,2 sekundoj. Kvankam ŝajne ĉiam malplilongigante la tempon estis neniu sugesto ke Eric surprizos la atletan mondon tiun saman vesperon.

Dum tiu tago Eric ricevis noton de iu en la brita grupo :

> "En la Biblio vi povas legi "Miajn honorantojn mi honoros" (1 Sam 2:30). Dezirante al vi ĉiam sukceson."

Ĉu tiu promeso estis en lia menso kiam venis la horo por la konkurso ? Kiel kutime el Eric, li manpremis ĉiujn siajn kontraŭulojn kaj atendis la krakadon de la startpistolo. Ĝi ja krakis kaj Eric preskaŭ eksplodis antaŭen, kurante dum la unuaj 200 metroj je la sama rapideco de tiu kiu venkis en la 200-metra konkurso la antaŭan tagon. Ĉu li povas tiel daŭri ? Ŝajnis ke eble ne, ĉar la aliaj pli kaj pli proksimiĝis al li, kiam subite li trovis novan fonton de energio kaj anstataŭ ol malrapidiĝi li akcelis kaj eĉ plilongigis la distancon inter si kaj la dua konkursanto, ĝis finfine li estis antaŭ li kvin metrojn kaj gajnis olimpian titolon en monda rekorda tempo de 47,6 sekundoj.

Kia ŝanĝo en la sinteno de la ĵurnalaro kaj de la publiko : elstara konkursanto, populara atleto, inspirita skoto, nia modesta ĉampiono, vortoj ŝajne mankis por esprimi la laŭdadon kiu nun koncentriĝis sur Eric Liddell. Sed kion faris Eric post la venko ?





Kviete li fortiris sin el la stadiono, ĉar li devis pretigi sian predikon por la venonta dimanĉa Diservo en la skota preĝejo. Iuj aferoj estis pli gravaj ol konkursado.

Reveninte al Skotlando, li ĉeestis la universitatan ceremonion en kiu li ricevis sian sciencan diplomon, post kiam sur la ŝultroj de siaj kunstudentoj oni portis lin tra la stratoj de Edinburgh.

La celo de lia studado estis ke li ekipu sin por misiista laboro en Ĉinujo. por ke li povu pli bone klarigi siajn religiajn kredojn, li pasigis pluan jaron studante teologion en la Skota Kongregacia Kolegio, sed lia tuta vivmaniero estis pretigado por respondo al la Dia volo. Kvankam li daŭris konkursi, li ankaŭ akceptis invitojn prelegi en preĝejoj, lernejoj kaj kolegioj, predikante la Evangelion, kaj partoprenis la multajn de tiu epoko evangelizajn kampanjojn inter studentoj.

Dum la somero de 1925 Eric pretigis sin foriri al Ĉinujo. Amasoj ĉeestis liajn adiaŭajn kunvenojn en Glasgow kaj Edinburgh, kaj miloj venis, iuj ridantaj, aliaj plorantaj, adiaŭi lin kiam li iris por kapti la vagonaron en la stacidomo de Edinburgh. Oni komencis kanti la himnon : *Jesus shall reign* (Jesuo regos, Isaac Watts, en Adoru Kantante 148), kaj baldaŭ la tuta stacidomo reeĥis per himno post himno ĝis finfine la vagonaro foriris. Adiaŭ, Skotlando. Tian adiaŭadon neniu misiisto antaŭe aŭ poste spertis.

Eric Liddell alvenis en Tjanjin, ĉina enlanda haveno cent kilometrojn sud-oriente de Beijing (Pekino), kie li instruis en la angla-ĉina kolegio, kaj tie li deĵoris ĝis 1934, kiam li edziĝis al Florence McKenzie, filino de kanadaj misiistoj. Baldaŭ post la geedziĝo, la misiistoj konsciiĝis pri la manko de misiista personaro en la kamparaj regionoj kaj petis Eric iri al Xiaoĉeng, tiu sama vilaĝo kie liaj gepatroj dum tiom da jaroj laboris kaj kie nun lia frato Robert laboris kiel misiista kuracisto.

Xiaoĉeng tute malsimilis la cirkonstancojn kaj ĉirkaŭaĵojn de Tjanjin. Ĝi estis vilaĝo en la granda norda ebenaĵo de la Hebej (Hopei) provinco, kie kampoj ruiniĝis pro senpluveco aŭ pro la detruado de rabantaj soldatoj, kiuj povis esti aŭ ĉinaj aŭ japanaj, ĉar la japana-ĉina konflikto estiĝis du-tri jarojn antaŭ ol la mond-milito eksplodis en Eŭropo. La popolo estis timigita, ĉiamaj viktimoj de malsato, malsano kaj inter-rasa milito. Vivado estis malfacila kaj ĉar la batalado nun kun la japanoj ĉiam estis apuda, la hospitalo estis plenplena, kaj la preĝejo kaj aliaj misiaj domoj estis rifuĝejoj por centoj precipe dum atakoj.

Eric amis la homojn inter kiuj li nun laboris, kaj reciproke ili amis lin. Li multe helpis ilin en iliaj malfacilaĵoj ; ili ofte konsultis lin pri multaj aferoj. Li ankaŭ protektis ilin kontraŭ la japanaj soldatoj, kiuj de tempo al tempo aperis, kaj estis por ili *tower of strength* (fortika turo, kp. Psa 61:3).

Pro la evoluanta milita situacio en Eŭropo en 1939, Eric kun sia edzino kaj nun familio de du filinoj revenis al Skotlando. Poste Eric revenis al Ĉinujo dum la familio iris al Kanado sed eventuale ankaŭ ili revenis al Ĉinujo, Eric en la misiejo en Xiaoĉeng, la familio al Tjanjin. Tamen tiuj estis perpleksaj tagoj kaj kiel aliaj misiistoj ili estis devigataj decidi pri sia estonteco. Eric, timante pri sia familio, resendis ilin al Kanado kien ili alvenis en majo 1941, sed li mem restis en Tjanjin kvankam eĉ tie misiista laboro estis malfacila. En septembro li ricevis telegramon kiu sciigis lin pri la naskiĝo de tria filino, infano, tamen, kiun li neniam vidos.

Je la fino de tiu jaro Japanujo eniris la mondmiliton, atakante Pearl Harbour en la Pacifika Oceano, tiel ke Ĉinujo fariĝis unu el la Aliancanoj (Britujo, Francujo kaj aliaj), kaj Japanujo kuniĝis kun Germanujo kaj Italujo. La japanaj instancoj do malfaciligis aferojn pro ĉiuj britoj inter kiuj estis multe da misiistoj. Unue Eric estis libera en la limoj de la misiejo en Tjanjin, sed post jaro, kun aliaj oni transportis lin al internigejo en Wei Xian (Uejŝjan aŭ Weihsien), antaŭa misiejo proksimume 200 metrojn longa kaj 150 metrojn larĝa, kie 1 800 geviroj kaj infanoj provis loĝigi sin tiel eble plej komforte. Ili ne sukcesis. Oficiale ili ne estis "milit-kaptitoj", sed, tamen ili ne estis liberaj eliri el la internigejo. Ofta nom-vokado por registrado, manko de adekvataj manĝaĵoj kaj aliaj aferoj mense, spirite kaj korpe malfortigis ilin.

Eric Liddell mortis en tiaj cirkonstancoj la 21-an de februaro 1945. Estus facile kulpigi la kondiĉojn inter kiuj ili vivis, kaj eble tiaj kontribuis, sed la fakto estas ke li malsaniĝis dum januaro suferante pro intensaj kapdoloroj. Li iom resaniĝis sed videble io miskunkciis ĉar li deprimiĝis kaj kelkfoje konfuziĝis kaj finfine malfeliĉe li mortis pro neoperaciebla tumoro de la cerbo.

Je la enteriga Diservo, la pastro diris :

"Kvankam lia respondeco en la internigejo estis ĉefe pri la religia kaj atleta fakoj, lia malavara sinteno kaj lia preteco ĉiun helpi amatigis lin al kaj la junuloj kaj la maljunuloj. Pro lia humila kaj modesta maniero neniu





estus diveninta, ke Eric havas internacian reputacion sur la atleta kaj futbala kampoj. La subita forpreno de tiu homo, ankoraŭ relative juna, devigas nin serĉi respondojn al demandoj en niaj koroj. Kial Dio alprenis lin al Si el mondo kiu tiom bezonas tiajn homojn ? Sed Dio ne eraras. Liaj pensoj ne estas niaj pensoj, nek Liaj metodoj niaj metodoj. Eble en la amemaj celoj de Dio, per la frua prenado al pli alta servo, li estas savita de jaroj de suferado. Ni nur povas kliniĝi antaŭ la volo de Dio. Oni diris al mi, 'El la homoj konataj al mi, Eric Liddell estis tia en kies vivo kaj karaktero la spirito de Jesuo Kristo estis eminente elmontrata'. Ĉiu el ni kies privilegio estis koni Eric-on reeĥas ĉi tiun opinion. Kio estis la sekreto de lia konsekrita vivo kaj vasta influo ? Entuta sindono al la volo de Dio regata, li sekvis sian Majstron kaj Sinjoron kun dediĉo kiu neniam ŝanceliĝis kaj kun intenseco kiu devigas la homaron vidi kaj la realecon kaj la potencon de vera religio."

Thomas Neil, Britujo

Thomas NEIL, brito (skoto) (1928), konvertiĝis kaj baptiĝis kiel junulo, aliĝis al la Baptista Eklezio de Skotlando, kie li servis i.a. kiel diakono. Diplomita de la universitato de Glasgow (Glasgovo) pri matematiko kaj klasika greka literaturo, li lekcias pri matematiko. Lerninte Esperanton en 1949, li estas nun kasisto de la brita sekcio de K.E.L.I.

MI JAM ESTAS PLI OL 80-JARA, sed mi estas juna kaj malfermita al ĉiuj nuntempaj problemoj. Mi estas la plej malnova Esperanto-revuo daŭre aperanta. Petu senpagan specimenon. Espero Katolika, Via Berni 9, I-00185 Roma, Ital. Jarabono 22 svis. fr. aŭ egalvaloro. Reprezentantoj en 32 landoj.

espero katolika

SENPAGAN SPECIMENON de "Espero Katolika" (la plej antikva el la vivantaj E-gazetoj) vi povas peti, skribante al IKUE, Via Berni 9, I-00185 *Roma* RM (Italio). "Espero katolika" estas monata revuo, kiu pritraktas krom kristanismaj travivaĵoj, ekumenajn problemojn kaj humanajn aktualaĵojn. Jarabono: 25 svisaj fr. aŭ egalvaloro; nepagipovaj skribu por interkonsento.

OFICIALA ORGANO DE I.K.U.E. INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA

## ENHAVO

KRISTANE

Li parolas kun aŭtoritato *(Th. Rotthaus)*
Afriko, timoj kaj esperoj *(F. Ruaro)*
Pri la t.n. Aperoj en Medjugorje *(F. Gruić)*

HUMANE

Religia libereco por monda paco *(B.C.)*
Letero el Zairio
Fabela Vladivostoko *(S.A.)*
Iluzio

MOVADE

Esperanto-animzorgado en Pollando *(S. Płatek)*
Vatikana Radio
Aperis « Evangeliaj Kajeroj » *(B. Cadei)*

EKUMENE

La eldono de la Nova Testamento de IKI *(A. Duranti)*
Unu komuna Biblio en la japana *(N. Inone - T. Ono)*



## FAMILIA SPIRITA VIVO

Mi sincere ĝojis, kiam mi estis invitata skribi iomete pri ĉi tiu temo. Mi estas fake nek psikologo, nek famili-terapeŭto, tiel ke mi ne sisteme ellaboros teorian traktaton aŭ transdonos al vi tre "saĝajn rekomendojn" de supre. Sed mi klopodos surpaperigi kelkajn personajn spertojn kaj travivaĵojn, kiuj "spicas" bonguste nian familian kunvivadon. Samtempe mi kore invitas vin eltrovi kaj primediti viajn proprajn personajn spertojn kaj manierojn de konduto. Tre verŝajne iuj el viaj estas similaj al la miaj, sed same certe aliaj estos pli aŭ malpli malsimilaj. Dankon al Dio, ni homoj ne estas uniformaj seriaj produktaĵoj el iu ĉiela muntoĉeno.

Bonvolu permesi al mi, ke komence mi plej mallonge prezentas nian familion al vi. Mi mem estas nun 43-jara poŝtoficisto kaj de pli ol 18 jaroj feliĉa edzo de mia karulino Else, kiu estas la vere komprenoplena koro kaj motoro de la familio. Se mi estas nervoza aŭ ekscitite, ŝi restas la trankvila kaj retrankviliga poluso ĉe ni kvar. Nia 12-jara Irene estas samtempe "ŝia grafina moŝto", la precizega "justec-konscienco" en nia familio kaj plej evidente "libro-vermo", englutante po 4-5 libroj semajne. La kvara estas Johannes, 10-jarulo, kiu samintensece malamas legi en libro, preferante aŭdi kasedojn, rigardi ĉiajn bildrakontojn, se li ne postkuras iun piedpilkon kun laŭtaj krioj. Efektive ni delonge havas etan gaston : Flipp, nia papageto kaj plej diskreta konversaci-partnero por Johannes, kiam li havas problemojn ne eldireblajn antaŭ ni aliaj tri.

Se vi demandus nin pri karakteriza trajto de nia familio, mi verŝajne dirus unue : mi sincere esperas, ke ni estas tute normala familio, sen iuj ajn eksterordinaraĵoj. Certe ni estas neniel perfekta komunumeto, spertante tiom da "altoj" kaj "malaltoj" kiom verŝajne multaj aliaj familioj estas spertantaj. Sed due mi eble do havas respondon pli trafan : ni ĉiuj klopodas havi multan tempon unu por la aliaj.

Ekzemple estas nia celo tiel ofte kiel eble ludi kune, ĉu kartojn, ĉu iun societan ludon pri vetkuro aŭ pri divenado, ĉu iun tabulludon, ĉu ŝakon k.s. Ĝuste hieraŭ Johannes pete skribaĉis sur papereton : "Paĉjo, ne forestu hodiaŭ vespere !" Precipe Johannes amegas tiujn kunsidojn kaj kunludojn, sed ankaŭ mi mem. Mi volonte konfesas tion. Kaj vere, ĉi tiuj ripete pruviĝas plej valoraj horoj por ni ĉiuj, kaj kiel unuopuloj kaj kiel familio. Preskaŭ ĉiam ili estas horoj de ĝojego, plenaj je ridoj, malstreĉiĝo. Aŭ Irene kaj

mi pli-malpli regule iras en vienan (Wien, *vin*, Vieno) popol-operejon por kune spekti operojn, operetojn, muzikalojn aŭ baletojn. Ĉio ĉi vekas en ni multajn ideojn, opiniojn kaj sentojn, pri kiuj ni povas interŝanĝe paroli. Ĝuste en la nuntempaj maturiĝjaroj de Irene, ĉi tiuj komunaj spertoj ofte enhavas bonajn deirpunktojn por intertrakti personajn malcertaĵojn, dubojn. Ĉar Johannes tre amas sporte movi sin, ni ofte naĝas aŭ iras sportkampojn. Aliflanke li volonte akompanas Else-n kaj min vizitante muzeojn, ekspoziciojn, planedarion, ktp. Pro ĉi tio, li prenas aktivan parton je niaj hobioj.

Eble vi nun opinias, ke ni volas tiamaniere ligi niajn gefilojn al ni mem. Tute male, niaj du havas multajn amikojn lerneje, paroĥe kaj en la movado *"Marriage Encounter"*, je kiu ni de longe aktive partoprenas. Sed la familio estas por ni tre granda valoro, same la interfamilia komunikado estas plej altgrade grava en nia valorhierarkio.

Certe ekzistas multaj aliaj ebloj por pli-malpli intensa renkontiĝo en la familio, sed mi koncentriĝos sur ĉi tiuj vesperaj "kunsidoj" por ne tro tedi vin. Ni kunsidas ne ĉiam regule ĉiuvespere, kelkafoje nur du aŭ tri fojojn en la semajno, sed kelkafoje eĉ ĉiutage. Sed plej grave estas, ke ĉiu restas libera partopreni aŭ ne partopreni, kvankam la realo montras, ke precipe Johannes preskaŭ ĉiuvespere serĉas eblon ludi aŭ babili kun ni. Ni refreŝiĝas kune kun ili de ilia griza ordinara tago, de ilia ĉagreno, ilia penado, kiujn ili havis (agrabla kromefiko de nia kuneco vespera estas, ke niaj gefiloj ne ofte rigardas la televidajn programojn antaŭvesperajn, kiuj ĉe ni en Aŭstrujo ne malofte entenas scenojn brutalajn aŭ kontraŭpacajn).

Eble vi diros nun : "Ĉio ĉi ne estas io eksterordinara. Temas nur pri afereto." Vi estas tute prava, sed ĉu nia ĉiutaga vivo ne konsistas precipe el tiaj "ordinaraj momentoj", kiuj tute ne estas memkompreneblaĵoj ? Vere ili estas diaj donacoj. Donaco por mi, por ni ĉiuj. Ĝuste en tiuj situacioj ni povas kaj devas ade klopodi "iĝi vere homo" pli kaj pli, t.e. evoluigi en ni personecon kaj fundamentajn teniĝojn (fido, espero, amo) tielajn, kiel la Sankta Spirito instruadas al ni. Iĝi homoj, kiuj plej honeste amas sin mem, siajn kunhomojn, Dion. Homoj kapablaj je rido kaj tristo, geviroj, kiuj konas siajn personajn povojn, eblojn kaj ĥarismojn minimume tiel bone, kiel ili konas siajn karakterajn malfortojn. En tiaj "ordinaraj momentoj" ni povas komune lerni esti liberaj kaj ĝuste uzi nian liberon, esti individuoj unikaj en la tuta mondo kaj samtempe kapablaj je veraj kaj profundaj homaj interrilatoj. Propraŝence iĝi veraj homoj laŭ la fascina modelo de Jesuo, kiu iĝis tute





solidara kun ni homoj por montri kaj ebligi al ni la ĝustan vojon. Mi kredas, ke en Jesuo la revo de Dio pri la estonteco de la homo(j) estas jam realigita, veriĝinta.

Estas iuj vesperoj, kiam Irene ne volas ludi kun ni, sed preferas legi en siaj libroj. Aŭ Johannes volas ludi sole per mia hejmkomputileto. Poste li denove serĉos ludkamaradojn. Johannes sincere ĝojas, kiam Irene ne estas ĉe sia amikino, sed estas kun ni hejme. Sed se ŝi forestas, li ankaŭ ĝojas. Tiam li povas sole elekti la ludojn. Tre lerte li eluzas ambaŭ situaciojn. En tiu ĉi rilato li ofte montras ian admirindan liberecon je memdecido kaj ĝojo, klopodante akordiĝi kun ambaŭ ebloj.

En ni ĉiuj estas interne ĉefunde forta sopiro esti si mem, esti kapabla en iu situacio diri jes aŭ ne, esti libera en siaj decidoj, kio tute ne estas egala al senrespondeco. Tiel, kiel niaj infanoj atingas la aĝon de junuleco, Else kaj mi, kiel gepatroj, havas la devon malfermadi antaŭ ili sferojn de respondeco, memdecideblo pri aferoj, kiujn ili povas prijuĝi. Ĉi tio ne estas ĉiam facila tasko, komune ade eltrovi kaj elekti novajn respondec-sferojn, nek por ni gepatroj, nek por Irene aŭ Johannes. Sed jam plurfoje ni ĉiuj spertis la esencan diferencon, ĉu Irene decidis mem pri iu afero (ekz-e pri io en sia lernejo aŭ kion ŝi kunprenu por sia skikurso), aŭ ĉu ni diktis nian decidon al ŝi. Certe ni volonte dividas kun niaj infanoj ĉion, kion ni mem estas spertintaj kaj travivintaj. Ĉi tio helpas al Irene lerni ĝustamaniere kaj memdecide uzi sian propran liberon. Irene komencas fariĝi adoleskantino kun propraj ideoj kaj propra volo.

Johannes ankoraŭ estas vivoplena knabo. Liaj precipaj interesoj estas ankoraŭ tre infanecaj. Sed mi opinias, ke senbrue li estas jam bone survoje trovi sin mem. Kelkafoje mia edzino kaj mi havas la impreson, ke li akiras plej multajn ekkonojn pri si mem en la "spegulo", kiu niaj vivo kaj teniĝoj estas por li. Modelon li komprenas pli bone ol multajn vortojn de instruisto. La gravecon de mia personeco por Johannes mi ekzemple plej akre rimarkas en situacioj, kiam mi devas montri min kiel neperfekta, erarema patro. Ĉi tiun neplaĉan bildon li estas kapabla nur kontraŭstareme akcepti. Sed mi estas, kiu mi estas, kaj ankaŭ li estas lernanta akcepti sin mem tia, kia li estas. Certe ne ĉiam tio ĉi estas tre facila tasko, sed multe pli facila ene de familio ol ekzemple en lernejo, k.s.

Sed Johannes ankaŭ amas rakontetojn. De kelkaj semajnoj ĝuste antaŭ lia enlitiĝo Else kaj mi rakontas al li iun eventon el nia infana aĝo. Tio vere entuziasmigas nian filon kaj li laŭte rememorigas nin pri tiu "rajto" lia, se iam ni estas forgesontaj. Per ĉio

ŝi ni ofertas helpon, konsilon, sed antaŭ ĉio komprenemon, komprenvolon. Ni penas rakonti persone, sed ne maldiskrete aŭ babileme, pripense kaj ne nur spontanee (kio estas certe grava), senentuziasme kaj ne nepre eŭforie, kun iom da memgardemo kaj konsidero je "spiritaj intimsferoj", sed ankaŭ kun multe da kuraĝo. Ne nur Johannes ŝatas tiujn minutojn.

Ne ĉiam ni povas atingi unuecan "starpunkton" aŭ "solvon" en la familio kaj kiom niaj Irene kaj Johannes grandiĝas, tiom ĉi tio iĝadas malfacila. Ekz-e, de tempo al tempo, Irene kaj Johannes ne povas interkonsentiĝi pri elektota ludo. Tiam ili devas elsolvi, kelkafoje eĉ "elbatali" konflikton de interesoj. Ĉi tio estas plej grava por sana personevoluo: eklerni elteni kaj venki pace (!) malkonsentojn. Aŭskulti la alian, sed samtempe esti certa pri siaj propraj celoj. La reciproka amo montros eble vojon plaĉan al ambaŭ. Ne malofte en tiuj situacioj mi iĝas nervoza, kiam niaj du gefiloj tiel kverelas, sed mi mem devas lerni havi fidon je la bona volo de niaj du, mi devas eklerni resti trankvila kaj pozitiva. Aliflanke mi ripete spertis, ke estas valora kontribuaĵo en nia familio povi libere komuniki al la aliaj ĉiujn miajn pensojn kaj sentojn, ekz-e en iu situacio mi iĝas maltrankvila kaj "eksplodema". Tio donas al la aliaj bonan ŝancon adaptiĝi al mia momenta psika stato (aŭ ne) per persona decido.

Ne malofte niaj du infanoj havas pli bonajn ideojn, estas pli optimismaj ol ni mem. Je aliaj okazoj ni devas inspiri al ili kuraĝon, devas helpi forigi timemon. Tre ofte ni klopodas konscie laŭdi ilin kaj ne nur kritiki. Ĝenerale sinceraj laŭdo kaj rekono estas multe pli helpaj ol kritiko, eĉ ol la t.n. "pozitiva, konstrua". Kelkafoje ni devas "bremsi" aŭ minimume ni penas bremsi. Estas grave por ni, ke ni klopodas instrui al ili ĝustajn principojn, fidante, ke ankaŭ ili estos aplikantaj ĉi tiujn ĝuste (Nature ili plej skrupule observadas, ĉu ni mem vivas laŭ tiuj "principoj"). Ankaŭ ĉio-ĉi rekte elfluas el nia komuna deziro je "dialogeca vivostilo", kunvivado en dialog-preteco. La infanoj pli kaj pli helpadas min iĝi patro, kiu vere amas siajn idojn, same kiel plej esenca trajto de patreco estas asisti ilin iĝi memstaraj, memrespondecaj, liberaj homoj, kiuj kuraĝas esti si mem (Ĉi tiu "vivo en dialogo" estas bela evolu-vojo por ni ĉiuj, minimume ĝis nun, kvankam mi mensogus asertante, ke ĉi tiu vojo estas ĉiam facila kaj rektlinia).

Mi ĵus diris, ke kelkafoje ni devas fortigi kuraĝon en niaj du gefiloj. Ankaŭ mi mem ne malofte bezonas la helpon de mia Else, ĉar mi tre facile perdas kuraĝon kaj iĝas predo de iu senesperiga rezignacio. Sed ĉio, kio devas plukreski, ne povas fari tion sen





iuj ajn riskoj. Ankaŭ vivo en vere homaj interrilatoj bazitaj sur fido, espero kaj amo devas preni riskon sur sin. Aliflanke ĝi ne havas la internan forton por sana plukreskado. Mi ne ekskludas min mem asertante, ke estas grave ekzerci sin je la "ĝusta" risko (Kiel ŝtatoficisto kun pli aŭ malpli certa salajro mi ne estas tre riskema). Estas preskaŭ kortuŝe aŭskulti la infanojn dirantajn : "Paĉjo, ni estas tute certaj, ke vi do ellernos sketi baldaŭ. Ni helpas vin !" (Sen ili mi ne havus esperon, ĉiam kritikante min mem kiel "ŝevalon sur sketiloj").

Dum niaj manĝoj kaj lud-horoj ni ne malofte babilas pri ĉio ebla. Johannes rakontas siajn plej novajn travivaĵojn en la lernejo aŭ pri siaj (mal-)venkoj en ĵudo. Sed ankaŭ Irene ofte dividas kun ni siajn spertojn de la tago. Ŝi nun estas jam meze de sia maturiĝperiodo kaj eltrovas preskaŭ ĉiutage ion novan (kaj ni kun ŝi kaj pri ŝi). Ne ĉiam ni povas ĉion diritan akcepti aŭ aprobi, sed ni klopodas ĉiukaze reteni malfermitajn orelojn kaj koron por ŝi. Ĝuste en tiu ĉi vivo-fazo ŝajnas al ni esti plej esence kaj atingende, ke ni reciproke konservas kuraĝon, fidon kaj pozitivajn spertojn (eĉ "antaŭjuĝojn") pri rakontado kaj aŭskultado. Rakontado en sincero kaj malfermiteco, aŭskultado ne nur per la du oreloj, sed per la "koro". Iusence ni gepatroj povas kunkreski kun niaj infanoj. Konkrete tio estas por mi, iĝi pli trankvila, pacienca patro, kiu ne plu devas havi la lastan vorton en ĉiu konversacio kaj kiu ne ĉiukaze estas prava. Nia Irene ne estas kliŝo de mi, de Else aŭ de iu alia.

Ni ne preteratentu, ke ni kune lernu aŭskulti kaj ni plimaljunuloj povus esti modelo por niaj "malgranduloj" (kp. Mk 4:9). Multe tro ofte ĉiu el ni nur parolas, sen tio ke li mem penas atente aŭskulti. Kiam ni povas bone aŭskulti, kion niaj gefiloj rakontas al ni kaj kiam ni sukcesas tion montri al ili per niaj respondoj, tiam ili ankaŭ lernos aŭskulti al ni kaj pripensi pri ĉio dirita. Estas vere : "Dio donis al homo du orelojn, sed nur unu buŝon !" Ĉi tiuj homaj spertoj estas bonega deirpunkto por preĝo : "Dio, bonvolu doni al mi koron saĝan kaj kompreneman (kp. 1 Reĝ 3:12), koron aŭdantan, koron aŭskultantan je tio, kion Vi estas planinta pri mi !"

Certe ne ĉiam estas tiuj interbabiloj tre "inteligentaj" aŭ pacaj. Kelkafoje aŭ pli ĝuste dirite iom ofte nia konversacio "elĵetas fajrerojn", kiam opinioj forte kontraŭpuŝiĝas. Ni devas ankaŭ kune lerni disputi ĝustamaniere, elteni diversajn opiniojn, reciproke toleri sen tio, ke ni samtempe subpremas niajn proprajn personecon aŭ opinion. Ni devas kune lerni, ke ni povas ami nin reciproke ankaŭ en situacioj, kiam ni havas malsamajn konvinkojn.

Ĉiukaze ĉi tiam ni estas kapablaj sperti nian riĉon je personaj ĥarismoj kaj nian kunecon en familio, kio estas tre grava por ni senti sin ne soleca aŭ izolita en mondo, kiu postulas de ni tiom multe ĉiutage. Ĝuste hieraŭ Johannes penis ridete varbi Irene-n, ke ŝi kunludu kartojn kun ni : "Venu, fratinjo, kuneco igas forta !" Senti nin hejme, scii, ke mi estas helpata kaj subtenata de iuj, kiuj klopodas kompreni ankaŭ miajn etajn kaj egajn zorgojn. Ĉi tiu sperto de sekuro kaj ŝirmateco estas tiel pozitiva fonto, ke esper-eble poste niaj infanoj povos havadi aŭ reakiri veran fidon je la interna Di-donacita bono de la kreitaĵo, je la imanenta reala aŭ latenta bono en siaj kunhomoj kaj eble partneroj, kaj ili ne mal-esperos spite de certe neeviteblaj malfacilaĵoj, kiujn sendube ankaŭ ili devos majstri.

Travivaĵeto, kiu restas ankoraŭ tute freŝa en mia memoro, kvankam ĝi okazis jam antaŭ tre multaj jaroj, estis jeno : Estis tempo por enlitiĝo. Tiam diris Irene al Johannes : "Ne forgesu. Ci povas fari ion ajn, Panjo kaj Paĉjo ĉiam amos cin !" Tiuj ĉi vortoj de fido je ni vere ĝojige skuegas nin. Cetere ĉu vi ne opinias, ke ĉi tio estos ankaŭ stabila fundamento por trovi kaj ekami Dion amoplenan, akcepti interrilatiĝon kun tiu, kiu jam de komence multege pli amadas siajn geinfanojn ol iu ajn patrino aŭ patro surtere ?

Dum la kristnaskaj tagoj Irene kaj Johannes pli aŭ malpli hazarde malkovris malnovajn restaĵojn el sia plej juna aĝo : diapozitivojn, kiuj montras ilin kiel bebojn, desegnaĵojn faritajn en la infanvartejo aŭ eĉ pli frue, kaj kasedojn, sur kiujn ili estis surbendigintaj infanajn kantetojn kaj poemetojn. Rigardante bildon, Johannes subite ekkriis : "Estas vere mi, kiu estis tia !", laŭte klakante per siaj manoj. "Sed nun mi tiel grandiĝis !" Kontraŭe Irene sin deturnis malaprobe de iuj bildoj murmurante : "Mi estas tute alia !" En ŝia nuna maturiĝ-fazo estas iel malfacile por ŝi, akcepti sian historion kun ĉiuj detaloj, siajn radikojn tiel profundajn en sia vivo. Ambaŭ spertoj estas necesaj : agnoski miajn multajn radikojn (familiajn, sociajn, religiajn, ekleziajn), sed ankaŭ mian personan aliiĝon, mian ŝanĝiĝon pli-malpli mal-rapidan, mian maturiĝon korpan kaj psikan, mian maljuniĝon.

Sed memkompreneble ne nur Irene kaj Johannes emas rakonti pri siaj novaĵoj je niaj vesperaj ludoj kaj konversacioj, sed ofte ankaŭ Else kaj mi raportas de niaj travivaĵoj, de la oficejo, de la paroĥo, ktp. Ĉi tio estas eblo, kiam ni mem povas dividi nian vivon kun Irene kaj Johannes. Je tiuj okazoj ni ofte kune planas la sekvajn tagojn en la familio. Paŝon post paŝo Irene kaj Johannes aktive kundecidas pri tiuj planoj. Per tio ili ekas lerni, ke





homoj havas ne nur rajtojn, sed ankaŭ devojn rilate al si mem, al la familio kaj al la aliaj. De tempo al tempo ni kune partoprenas en agoj pri la Tria Mondo en loka paroĥa grupo. Estas grave rigardi atente transe de niaj propraj belaj "ĝardenetoj".

Kiam ni priparolas la travivaĵetojn de la tago pasinta, ne malofte elmerĝiĝas demandoj, ofte laŭ ilia esenco nur etaj, sed gravaj aŭ eĉ malhelpaj por bona interkompreniĝo. Mi mem i.a. iĝas relative rapide indignema aŭ eksplodema, kaj agas laŭ tiuj sentoj, ekzemple se mia laboro en oficejo estis tro nekontentiga aŭ miaj planoj en la familio ne ĝuste realiĝis. En sia ludfervoro Johannes estas iel tro petolema kaj ferocema kelkafoje, dum Irene ne ĉiam montras sin tiel afabla kaj kunludpreta, kiel ŝi povus esti (kaj kiel Johannes deziras). Ankaŭ mia edzino Else estas perfekta "nur" je 99,9 procentoj. Ĉio ĉi povas kaŭzi grandajn aŭ malgrandajn rilatproblemojn, ni "pekemas" unu kontraŭ la alia(j). Kiel ni traktu ĉi ĉion ?

Iusence la familio estas plej fundamenta "lernejo de fidado kaj interrelatiĝo". Trovi la spurojn de Dio en nia vivo estas ne ĉiam facile. Sed ni povas lernadi unu de alia, kaj ĉiuj kvar kune kun la aliaj gefratoj, kiuj kredas je Dio. Se "ni dividas niajn vivojn" reciproke, ni eble atingas fine multe pli ol per longaj predikoj (kiuj certe estas ankaŭ gravaj, sed estu moderaj je longo). Ni ne devas perdi la kuraĝon, eĉ se la junuloj rezignas pri iuj tradici-aĵoj, kiujn ni amas. Ili faras tion ne pro tio, ke ili malŝatas ĉion ĉi, kion ni ŝatas, sed tial ke ili devas akiri ĉi tion denove por si mem, estante multe pli ol senvivaj aŭtomatoj. Ni ofte spertas tion je niaj ekleziaj, precipe paroĥaj rilatoj.

Dum tiu "serĉado" okazas ankaŭ multo, kiu ne estas bona, kaj ankaŭ ni "plenkreskuloj" estu ĉiam survoje kaj "kreskantaj je fido, espero kaj amo". Neniu estas perfekta nun (Kaj li ne devas esti jam tia, dankon al Dio !). Ni devas neniam forgesi ĉi tiun fakton. En la familio mi havas la ŝancon lerni fidi, ke mi estas amata spite de miaj bonfaroj kaj fiaskoj (pekoj). Se Johannes aŭ Irene "tro-igas", mi certe estas pli aŭ malpli malkontenta pri iliaj faroj, sed mi ne ĉesas ami ilin, ili ne ĉesas esti miaj amataj gefiloj. Tio helpas min kredi, ke ankaŭ Dio ne forlasas nin, kiam ni estas pekintaj kontraŭ Li, la homoj kaj la mondo, kiujn Li kreis. Jesuo venis por kuraci la malsanulojn. En la familio mi povas lerni akcepti, ke iukaze mi mem estas "malsanulo", kiu bezonegas resan-igon je mia korpo, repacigon je miaj menso kaj animo, je mia viv-historio. Mi estas multrilate helpbezona. Mi ne povas vivi kiel solulo sur dezerta, senhoma insulo enmeze de oceano. En niaj familiaj interrilatoj ni povas lerni reciproke elpeti sinceran pardonon

kaj esti pretaj kaj malfermitaj por resanigo, repacigo. Ne malofte mi spertas, ke firma kredo je ĉio ĉi ne estas facila afero, sed ĝuste pro tio estas bone ade ekzerci sin je tio ĉi en la familio. Grava ero de tiu procedo estas io, kion mi volas nomi "pozitiva antaŭjuĝo" (= mi plej firme kredas je tio, ke ĉiam ankaŭ la aliulo estas plej plensence "am-inda", ĉar Dio neniam faras fuŝaĵon). I.a. pro ĉi tiuj spertoj en nia familio mia propra teniĝo al pentofaro antaŭ Dio akiris tute novan kaj firman fundamenton. Ĉar mi ricevas donace "palpeblan" pardonon ĉi tie, mi ankaŭ firme kredas je la nemeritita pardono fare de Dio. Niaj interhomaj travivaĵoj havas konsiderindan influon sur niaj rilatoj al Dio, kaj inverse.

La procedo de pardonpeto, komuna klopodado pri repaciĝado kun mi mem, kun mia kara edzino, kun niaj gefiloj kaj kun ĉiuj aliaj kunhomoj, kaj ties fina efektiveco plej bone montras sin en nia "korpa lingvo". Ĉiuokaze nia korpo kaŝe aŭ malkaŝe "parolas", kiel ĝuste tiam ni sentas nin, ĉu ni volas aŭ ne. Pro tio "korpa lingvo" havas plej grandan rolon en nia familio. Certe en multaj kazoj ĝi devas esti pliklarigata per interparolo, sed vortoj "diritaj" per amoplenaj manoj estas kelkafoje multe pli konvinkaj ol diritaj per buŝo rapida. Malgraŭ siaj 50 kg de korpopezo Irene ĝuas ankoraŭ esti portata surŝultre aŭ surdorse. Imagu nur la bildon : la staturo de Irene jam superas tiun de Else ! Ĉi tiuj ŝiaj korpa teniĝo kaj sopiro esprimas multon nun ne facile esprimeblan buŝe por ŝi. Se Johannes estas tro ekscitita kaj ne nur ekbalbutas, ni ofte "interbabilas" per gestoj. Ĉe li malpeza karesado de lia kapo per mia mano aŭ nur simpla prenado kaj premetado de lia mano ofte estigas mirakletojn mutajn. La korpo, kiun donacis Dio al ni ĉiuj, estas miaopinie unu el Liaj plej belaj donacoj. Ni estu dankaj pro tio. Fakte estas nur pere de niaj korpoj, ke ni homoj estas kapablaj interrilatiĝi.

Ne malofte ni komencas aŭ finas niajn "babilhorojn" per kuna preĝo, ĝenerale simpla kaj libera, sed refoje ni malrapide preĝas nur la "Patro-Nia"-n. Foje, certe ne tro ofte, ni faras ion similan al meditado, sed nature precipe Johannes ne estas kapabla resti "senaktive" sidanta pli longatempe. Dio, kiu estas LA amo, estu ankaŭ la fundamento de niaj amrilatoj en nia familio, la dia Spirito estu la fonto de ĉia spirita vivo.

Certe ankaŭ ĉi-kaze la infanoj estas tute liberaj partopreni aŭ ne (preskaŭ sen escepto ili ĉiam volonte estas aktivaj), sed ni kelkafoje diras al ili, kial ni mem preĝas. Antaŭe Johannes ofte volis, ke ni legu al li ĉapitron el lia biblio por infanoj, kelkafoje ankaŭ nuntempe. Sed pli ofte li legas mem dum la tago. Ĝenerale ni plej simple rakontas al Dio, kion ni spertis dum la





pasinta tago. Kiel ni ankaŭ ofte kore dankas nin reciproke pro bonfaroj ricevitaj, ni ankaŭ dankas kaj laŭdas Dion. Irene kaj Johannes bone komprenas tion. Foje ne estas facile eltrovi kaj envortigi konkrete ĉion, kio estis bona dum la lastaj horoj. Ne malofte mi observas mian egan emon je supraĵa vivado. Sed kelkafoje estas ankaŭ tute bone iomete resti senvorte antaŭ Dio. Estas voĉeto en nia interno, kiu preĝas en ni kaj por ni mem.

Mi jam konstatis, ke Johannes ofte estas postulema kaj petola. Li estas tia ankaŭ dum preĝado. Li havas ĉiam sur sia koro petojn, kiujn li "proponas" al Dio. Iumaniere li estas tute "senĝena". Mi rimarkas, ke li estas multege pli "libera" en sia rilato kun Dio ol mi estis en mia juneco kaj ankaŭ nun miaj rialtoj al Li ne estas ĉiam "senproblemaj". Mi tre ĝojas pro Johannes, ke li havas la kuraĝon senti sin vere kiel infanon antaŭ sia ĉiela Patro. Eble estas iom interese, ke mi mem alparolemas Dion per "Sinjoro" aŭ "Sinjoro Dio", dum Johannes simple uzas "Kara Patro" aŭ eĉ "Kara Paĉjo".

Antaŭ Dio ĉiu el ni estas samtempe "preskaŭnululo" kaj plej valora persono, tiel valora ke Dio eĉ sendis Sian solenaskitan Filon por repacigi nin kun Li mem. Tial ni devas evoluigi en ni kaj veran humilecon antaŭ Dio, kaj ankaŭ ĝustan scion pri vera memvaloro, memfidon, mi preskaŭ dirus ĝustan memfierecon, pro tio ke Dio estas elektinta nin kiel Siajn nemeritite amatajn filojn kaj filinojn. Ni deziras, ke ankaŭ Irene kaj Johannes komprenu tion, trovante la ĝustan teniĝon rilate al si mem. Dio neniam faras fuŝaĵon.

Nia familio certe ne estas ĉiam bona ekzemplo por kuna preĝado. Tre ofte ni kantas modernajn kantojn, se ni povas nin bone ensenti en la tekstojn. Iuj kantoj estas danceblaj aŭ oni povas fari akompane taŭgajn gestojn. Ni ĉiuj ŝategas tiajn kantojn. Foje Else prenas sian gitaron aŭ sian ukulelon, dum Irene ludas bekfluton kaj Johannes akompanas nin laŭ sia maniero : li simple uzas triangulon kaj grandajn malplenajn ujojn de lavpulvoro kiel "perkut-instrumentojn". Tiam mi ofte estas la sola, kiu vere kantas, sed tia estas nia propra certe netipa kuna preĝado. kanti, danci kaj ludi antaŭ Dio ! Mi ne plu memoras, kiu diris ĉi tion, sed tiu ĉi invito ĉiam inspire allogas min. (Cetere en nia familio estas grava signo, ĉu iutempe ni ĉiuj aŭ minimume iu emas kanti aŭ ne. Se ĉiu malinklinas kanteti, ĉi tio estas malplej ofte trafa signo pri la ekzisto de "malbona aero" en la familio.).

Semajnfine ni foje ĝuas famili-ludon, kiun vi eble rigardos iom kurioza. Ni simple ŝanĝas niajn rolojn en la familio. Johannes

transprenas la rolon de la patro, Irene "eniĝas en la haŭton" de Else, plenumante la taskojn de patrino. Dume Else kaj mi mem iĝas denove infanoj. Ĉi tiu rolludo kreas ofte situaciojn, kiuj igas nin laŭte ekkrii pro egaj ĝojo kaj rido, samtempe donante al ni ĉiuj sufiĉe da materialo por remeditado. En multaj kazoj ni ricevas trafan "spegulon", observante niajn proprajn teniĝojn je aliaj aŭ aŭskultante niajn tipajn parolturnojn el la buŝoj de la infanoj. Ekzemple, kiam Irene kaj Johannes nin admonas fortavoĉe : "Fine do rapidu, ekenlitiĝu ! Ĉiam ili malrapidumas !" Aŭ kiam Irene petas pri io kaj ni simple respondas "Tuj". Ĉe Irene tiu vorteto "tuj" estas tre grava kaj oftega esprimilo, kiu povas eble signifi eĉ tre longdaŭran intervalon ĝis ŝi fine do plenumas nian peton. Je tiuj okazoj Irene eklernas, ke preparado de la manĝaĵoj ne estas tiel memkomprenebla kaj facila, kiel ŝi foje supozas (Tio estas precipe valida, se kvar kapoj havas kvar malsamajn ideojn por tagmanĝo). Aŭ falpuŝiĝinte meze en nia loĝoĉambro pro ludilo surplanka, Johannes laŭtvoĉe ekkrias : "Diablo ! Ĉiam tiu malordemo !", montrante pli aŭ malpli klarajn signojn de emociiĝo (Tio estas pura kopio de iuj teniĝoj de mi mem). Tiam Johannes kaj Irene observas, ke ne ĉiam la ordo postulata de ni estas tiel malkonvena (kvankam ĝis nun bedaŭrinde nenio estas ŝanĝiĝinta en realo). Ĉiukaze en tiuj tagoj Else kaj mi ĝuas preskaŭ trankvilajn vesperojn, ĉar "bonkondutaj" infanoj povas enlitiĝi pli frue ol siaj gepatroj. Ĉi ĉio estas okazo por komune konatiĝi pli profunde (kaj ridi kaj ĝojegi).

Instigo por nia hieraŭa preĝado estis filmo pri Francesco de Assissi (Francisko de Asizo), kiu starigis ne malmultajn demandojn por ni hodiaŭuloj kaj certe ne nur pri bestprotektado aŭ ekologio. Estis interese, aŭskulti la pensojn tiurilatajn de niaj gefiloj. Ili (ankoraŭ) estas multe pli idealismaj ol ni maljunuloj. Je sabatoj ni ofte laŭte legas la pecon el la Biblio, kiu estos la Evangelio de la sekva dimanĉo. Ankaŭ el tio plej ofte evoluas interesa interŝanĝo de pensoj kaj spertoj. Irene kaj Johannes amas ludi ludeton post legado de la evangelia teksto : kie mi trovas min en ĉi tiu rakonto, parabolo, ktp. ? Ĉi-jare en la kristnaskaj tradiciaj legendoj Irene trovis sin en paŝtisto-flutanto, dum Johannes volis esti en la "haŭto de la bovo", tial ke ĉi tiu estas plej proksima al la kripo. Krome ĝi povis fari bonaĵojn al Jesuobebo varmigante lin per sia spiro. Ĉu tio ĉi mirigas nin "plenkreskulojn" ? Nur komence ni ridetis, poste ...

Sendube tre baldaŭ ĉiu el ni kvar enkreskos en novajn vivperiodojn kaj situaciojn. Johannes devas ŝanĝi lernejon aŭtune, dum Irene jam estas malrapide provanta ekstari sur siaj propraj piedoj.





Eble Else rekomencas partatempe labori en oficejo. Sed ni esperas, ke ĉio ĉi lernata en la familia "lernejo de fidado kaj interrilatiĝoj" estos verŝajne helpa. Ĝuste pro la multaj suproj, sed ankaŭ spite de la malsuproj eltenendaj, vivo restas vere vivinda, moviga, alloga, se ni restas marŝantaj antaŭen. Neniu el ni estas iam tute soleca. Eble tiam vivo ne estas ĉiam facila, sed plena je aventuroj kaj surprizoj bonaj. Grave estas nur, ke ĉiutage ni penas resti survoje al pli da "fido, espero kaj amo" kaj "la plej granda el ili estas amo" (1 Kor 13:13). Estas tute sufiĉe ĉiutage konkeri nur etan ŝtupon antaŭen aŭ supren.

Vi certe rimarkis, ke ni tute ne estas iu eksterordinara familio kaj certe ni neniel estas perfekta aŭ ideala. Tio, kion ni volas unuopule kaj komune alstrebi, estas vivi laŭ la "plano aŭ revo de Dio", kiun Li havas por ĉiu homo. Mi konfesas, ke mankas al mi pli trafa nomo ; eble vi min rigardos nun naivulon, eble ĉi tiu esprimo ŝajnas al vi iom tro stranga, sed mi firme opinias, ke Dio deziras, ke ni homoj lernu vivi en intimaj, familiaraj, respondecaj, fidindaj rilatoj, kiuj estas karakterizataj per konfidoplena, malfermita, honesta kaj tenera komunikado. Ĉi tiu plano estas samtempa donaco de Dio kaj dumviva tasko por ni. Sendube ĉi tiu plano havas specialan dimension en geedza vivo, sed ankaŭ en niaj familioj ni povas vivi kun niaj gefiloj laŭ tiuj "diaj ideoj". Sed ankaŭ en aliaj vivkondiĉoj ni povas elekti vivon laŭ la dia plano, se ni nur volas. Ĉar laŭ sia esenco ĝi estas tre simpla : trovi kaj kreskigi en libero, fido, espero kaj amo ĝustajn rilatojn al si mem, al siaj kunhomoj kaj al Dio. Ĉi tio estas "vivo en abundeco kaj pleneco" (kp. Joh 10:10), kiun Dio intencas gracoplene donaci al ni ĉiuj. Miaopinie tia estas la centra kerno de la "Evangelio".

Hodiaŭ homoj ofte estas malfidemaj kaj certe ne ĉiam sen bona motivo ; ni estas ankaŭ malcertaj, kie trovi fidindaĵojn pri tiu "palno de Dio". Mi opinias, ke la tuta Biblio estas ĝisrande plenigita per tiaj fidindaĵoj am-vekigaj. Tiurilate miaj plej amataj lokoj en la Biblio estas Gen 1:27 ; 2:24-25 kaj Efe 5:25-32 k.s. Iuaspekte la tuta Evangelio (la bona mesaĝo) estas kvazaŭ "amletero de Dio-Patro al Liaj gefiloj", kiu volas montri al ni nian personan vokiĝon altan kaj konkretan, kiun ni povas realigi en nia vivo, kaj kiel unuopuloj kaj kune kun niaj kunhomoj, ekzemple ankaŭ en nia familio. La respondo al la dia voko estas la nia.

Por mi kaj mia familio plej esenca parto en tiu "plano" estas tio, kion mi volas nomi "dialogeca vivostilo". Unueco en diverseco, diverskoloraj unikaj floroj sur la diversaj florbedoj en la unu dia ĝardeno.

Certagrade niaj fragilecaj, sed ankaŭ sinceraj rilatoj povas esti signo (certe tre ofte nur malfortega, neklara signeto, sed malgraŭ tio vera signo) por la amrilatoj en Dio, por la mistero de la Dia Triunuo. Kaj mi firme kredas, ke ekzistas la paraleleco inter niaj interhomaj rilatoj kaj niaj rilatoj al Dio, ĉar ni ne estas skizofreniuloj. Ni simple ne povas dividi nian vivon en du reciproke sendependajn sferojn. Niaj teniĝoj estas unuecaj. Mi opinias ekzemple, ke se iu ne kutimas aŭskulti sian kunhomon, li verŝajne ankaŭ havos tre malbonaŭdan orelon rilate al Dio.

Kaj fine mi volas nur ree emfazi, ke pro tio, ke Dio amas ĉiun el ni, ankaŭ ni povas ami nin mem, niajn kunhomojn kaj Dion. Specialan lokon en ĉi tiuj rilatoj havas niaj familioj... Ĉu ne ? Augsutinus (Aŭgusteno) iam diris : "Amu kaj poste faru laŭ via volo !"

Eble vi trovas la oftan uzon de la vorto "lerni" stile kaj enhave malbona kaj neplaĉa. Aliflanke tiom longe kiom ni serĉas kaj lernas, tiom longe ni vivas. Se ni estas ĉesontaj aktive vivi tiamaniere, ni estas ekformortiĝontaj.

Heinz Platzer, Aŭstrujo





# LA RELIGIA VIVO DE LA FRATOJ PREDIKISTOJ

## I. ORGANIZO

*"Contemplata alii tradere"* (kontemplitajn transigi al aliaj), tio estas laŭ la latina formulo la devizo de la ordeno fondita de Sankta Dominicus (Dominiko).

Laŭ sia intuicio, Dominicus de Guzmán kreis tute novan manieron vivi la religian vivon : unuiĝo de la plej profunda preĝo kaj de la plej vasta agado. Li naskiĝis en Caleruega, urbeto de Kastilio, en 1170. Ek de sia infaneco, li estis orientita al la klerikaj studoj, sed li baldaŭ lasas la liberalajn artojn kaj ekskluzive studas la Vorton de Dio.

Kiel kanono de Osma, li foriras kun sia episkopo al Danlando. Survoje ili trapasis la sudan parton de Francujo. Tie, Dominicus malkovris spiritan mizeron : la Evangelio estas grave miskomprenita ; kaj samtempe la estroj de la katolika eklezio ne plu havis krediton apud la homoj. Ek de tiu konstato, la zorgo de Dominicus koncentriĝis sur la plej valora maniero prezenti al la homoj la Evangeliojn de Jesuo Kristo. Li mem multe predikis. Sed la plago estis larĝa kaj profunda : Dominicus kunvokis kaj volonte akceptis helpantojn. Kun ili, li preĝis, lernis la Skribojn, kaj sentime predikis. La tute nova aspekto de religia vivo ne estis burokrata konstruo ; sed praktika konsekvenco de homa problemo. Preĝo, lernado kaj komunuma vivo, tio estos la triforma rimedo de la efikaj agadoj de la Fratoj Predikistoj.

### 1. La STUDADO

El inter diversaj homaj laboroj por prediki klare la Evangelion estas la serioza studo de la Sankta Skribo, de la filozofio kaj de la teologio. Dominicus estas tiel konvinkita pri la neceso de religia scienco por konvinki la erarantojn, ke ek de la momento, kiam prezentiĝas al li por prediki la unuaj fratoj, li dissendas ilin en diversajn universitatojn por fariĝi doktoroj en filozofio, teologio, Sanktaj Skriboj,... en Paris (*pari*, Parizo), Milano, Köln (Kolonjo),... En la sama direkto, dum la 20-a jarcento, Patro Lagrange (*lagrãĵ'*) iras ĝis la kreado de la Biblia Lernejo de Jerusalem.

### 2. La LITURGIA PREĜO

Kune kun la persista studado, malgraŭ multaj kontraŭoj, la plej riĉa fonto de vero estas la preĝo, precipe la preĝo de kontemplado de Dio, per kiu la homa menso estas invitita de Dio mem atingi, pli kaj pli profunde, la mirindaĵojn de la dia mistero.

Same kiel la komunan studadon en universitatoj, Dominicus vol.s komunan liturgian preĝon adaptitan al la komuna evangelizo. Lasta realigo : la revigligo de la abatejo de Sylvanès (*silvanes*), de Patro André Gouzes (*ãdre guz*), sude de Francujo.

### 3. La KOMUNUMA VIVO

ĈIU esenca aspekto de la dominikana vivo : prediko, studado, preĝado, estas efektivigita, ne individue, sed komunume. Tio estas la kondiĉo, por ke tiu vivo estu por la mondo aŭtentika signo de la krista anonco :

"Ili ĉiuj estu unu... por ke la mondo kredu" (Joh 17:21)!

Ek de la unuaj jaroj de la ordeno, la prediko ne estis la afero de unu sola viro, sed de la tuta komunumo. Oni ne parolis pri la prediko de Dominicus, sed pri la "sankta prediko de Prouille" (*pruj*)...

### 4. La SANKTA PREDIKO

Pli kaj pli funde preparitaj per lernado, preĝo kaj komunuma vivo, la filoj de S. Dominicus kuraĝe anoncas la bonan novaĵon. Zorgemaj pri la adapto al la providencaj signoj de la tempoj, ili povas precize respondi al la bezonoj de siaj samtempuloj, laŭ la diversaj civilizacioj de la mondo. Predikistoj de la universala Parolo de Kristo, la Fratoj dominikanoj devas larĝigi kaj adapti siajn animon kaj predikon al ĉiuj homoj. Kiel aŭtentikaj tradiciistoj, ili transigas vivante, t.e. evoluante, la kristan heredaĵon.

Trapasante la psikajn limojn de iliaj naciaj kulturoj kaj lingvoj, ili adaptiĝas per la internacia lingvo al ĉiuj partoj de la mondo, kaj povas facile evangelizi la plej diversajn aŭdantarojn. Elstara "Frato Predikisto", Giacinto Jacobitti (*ĝiaĉinto jakobiti*) predikadis la tutan mondon per la ondoj de Radio Vatikana, kies esperantistajn elsendojn li iniciatis.

## II. SKIZA HISTORIO DE LA "FRATOJ PREDIKISTOJ"

Laŭlonge de la vivo de la ordeno preciziĝas ĝiaj kvar komencaj trajtoj.

### LA MEZEPOKA TEOLOGIA SKOLO

La rolo de Tomaso de Aquino (Akvino) en la ordeno de la Predikistoj estas fundamenta : kiel utile prediki, se oni ne havas la valoran sciencon ? Brila studento de Albrecht (Alberto) la Granda en la universitato de Köln, li fariĝis la plej lerta profesoro pri teologio en Paris, kie li konceptis sian faman Teologian Sumon. Senĉese li studis la pensojn de siaj samtempuloj. Malgranda, sed signifa anekdoto : iun tagon, invitita de la reĝo Louis IX (*lui*, Ludoviko la 9-a), Tomaso subite ekkrias : "Mi trovis !" Ŝokitaj, aliaj invititoj protestas, sed la reĝo simple ordonas alporti al





Tomaso plumon kaj paperon. Kaj dum la reĝa manĝo, Tomaso skribas sian respondon al la maniĥeanoj, kiuj pretendis ke en la mondo regas du principoj, unu spirita kaj bona, kaj la alia materia kaj malbona.

### LA MISTIKAJ REJNLANDANOJ

Pli ekskluzive mistika estis la vivo de la rejnlandaj dominikanoj dum la 14-a jarcento. Tiu periodo komenciĝis de la konflikto inter la reĝo Philippe le Bel (*filip' le bel*, Filipo la Bela) kaj la papo Bonifaco la 8-a. Al la internaj kaj eksteraj malfacilaĵoj respondas Majstro Johann Eckhart (*ekart*), Johann Tauler, Heinrich Suso. Ni havas valoran eĥon de lia spirita vivo en la libro de Suso : la horloĝo de la saĝeco, kiu, dividita en 24 ĉapitroj, unu por ĉiu horo, invitas la kredanton oferi sian vivon por la savo de la homoj.

### SOCIAJ TEOLOGOJ

Foririnta al la konkero de la Nova Mondo, konkeranto kun la hispanaj konkerantoj, Bartolomé de Las Casas elŝipiĝis en 1502. Per la *encomienda*, la hispanoj posedis ne nur la materialajn bienojn, sed la personojn mem de la indioj kaj de ilia familio. La juna kaj sincera Bartolomé baldaŭ komprenas, ke tiu socia organizo estas tute kontraŭa al la Evangelio, tiel ke ne sufiĉas parte korekti ĝin. Tiam li sekvas la prioron de la dominikanoj, frato Pedro de Córdoba, kiu proklamas la netolereblan maljustecon de la posedo de la personoj. Li rezignas pri ĉiuj siaj havaĵoj, baraktas kaj en Ameriko, kaj eĉ en la hispana reĝa kortego por la restarigo de la justeco. Neniu danĝero haltigas lin. Li skribas kaj predikas la unuan vivantan teologion de la libereco, principo kaj modelo de la nunaj teologioj de la libereco, kiuj disvolviĝas en Ameriko kaj en Afriko.

### PREDIKO KAJ TEOLOGIA LERNADO

Post kiam Henri-Dominique Lacordaire (*ãri dominik lacorder*) restarigis en Francujo la ordenon de la predikistoj, kaj, kun elstara sukceso, anoncis en la katedralo Notre-Dame en Paris la Evangelion de Jesuo Kristo al nekredanta socio, la kristana vojo estis malfermita. El inter multaj dominikanoj, Patro Lagrange (*lagraĵ'*) efike laboris, kreante la Biblian Lernejon de Jerusalem, kies valorega ellaboraĵo estis la *Bible de Jérusalem* (la Biblio de Jerusalem).

### NUNTEMPAJ TEOLOGOJ

En ĉi tiuj lastaj tempoj, grupo de dominikanoj, inspiritaj de la lucidaj kaj kuraĝaj Patroj Chenu (*ŝenü*), Congar (*kõgar*), ... lanĉis la ĉefajn ideojn de la Dua Vatikana Koncilio, kaj poste

**ilin defendis. Iliaj esencaj konvinkoj estis esprimitaj en la libreto verkita de Patro Chenu jam en 1937 kaj simple titolita :** *Une école de théologie : le Saulchoir* (lernejo pri teologio : la Salikejo), kie li instruis.

Louis Bourdon, Francujo

BIBLIOGRAFIETO

*Dominicains.* L'ordre des dominicains présenté par quelques-uns d'entre eux. - Paris : Cerf, 1980.

*Une école de théologie : le Saulchoir* / M.D. Chenu, avec les études de G. Alberigo, E. Fouilloux, J. Lardière et J.P. Jossua. - Paris : Cerf, 1985.





# LA SANKTA SPIRITO KAJ LA SPIRITA VIVO

Inter kelkaj bibliaj veroj, plej gravaj kaj konataj, **estas tiu parolanta pri la Sankta Spirito. Provoj esprimi ĝin ne estas facila. paroli ja pri la Eterna Spirito, oni ne povas sen timo. Kiam Jesuo promesis al siaj postsekvantoj sendi al ili la Parakleton, li substrekis, ke la Sankta Spirito daŭrigos la laboron en la Eklezio de Kristo.**

Mi havas hodiaŭ nek kapablon, nek deziron, paroli pri la teologia vidpunkto pri la Sankta Spirito kaj la spirita vivo. Mi povas diri nur tion, kion mi spertis en mia kristana vivo dank'al mia Sinjoro. la plej grava afero estas, ke Lia Spirito estas Sankta, kaj vere gvidas al la sankteco ĉiun, kiu deziregas plenumi tiun ordonon de sia Sinjoro. Tiel do, la Sankta Spirito unue kapabligas vivi Dian vivon kaj nur poste gvidas en ĉian veron.

En multaj kristanaj eklezioj tiuj ĉi proporcioj estas inversaj, bedaŭrinde. Mia eterna vivo, vivo spirita, komenciĝis kiam la Sankta Spirito venis sur min. Alia komenco ne ekzistas. Oni ne povas vivi Lian vivon sen posedo de Lia Spirito ! Sed posedi Lian Spiriton, oni ne povas aŭtomate, dum nia bapto. Tiu, kiu konas profundojn de nia koro purigas do la sanktejon de nia korpo por Sia Spirito. Estante obeema al Li kaj al Lia vojo, ni vere malfermas la pordon de nia vivo por Dio.

Spirita vivo signifas vivon laŭ la Spirito. "Ne estingu la Spiriton...", "Estu plena de la Spirito..." Tiuj ĉi, kaj aliaj, nov-testamentaj ordonoj montras la veran vojon por ĉiu kredanto. La filoj de Dio estas ja nur tiuj, kiujn gvidas la Sankta Spirito ! Tiun spiritan vivon neniu povas falsifiki. Tiun vivon oni ne povas eniri sen unue morti. Multaj kristanoj hodiaŭ ne povas vivi spiritan vivon, ĉar ili vivas laŭ iu koncepto aŭ instruo, anstataŭ akcepti Tiun, kiu donas la povon venki la pekon kaj la tenton. Li ankaŭ faciligas nian morton pri la malnova, karna vivo kaj pri la mondo.

Observante la vivon de la apostoloj, oni povas facile konstati, ke la pentekosta tago estis decida en ilia marŝado. Sen la Sankta Spirito, ilia vivo estus plue plena de fervoro, agado, sed... malproksima de la Dia Regno. Neniu homa faro meritas la eternecon. Tiuj, kiuj ne kapablis plenumi la volon de sia Sinjoro, simpluloj, ricevinte la Sanktan Spiriton, mirigis la mondon. Kaj ne nur mirigis, sed ankaŭ venkis ĝin.

# LA SANKTA SPIRITO KAJ LA SPIRITA VIVO

En la hodiaŭa kristanismo estas diversaj tendencoj en la traktado de la supra temo. Estas multaj homoj parolantaj pri la spiritaj donacoj (precipe unu du el ili) kiel la apogeo de la spirita vivo. Aliaj, neante eĉ Dian devenon de multaj spiritaj donacoj, parolas pri la spiritaj fruktoj, kaj nur pri ili, preskaŭ neniam ilin atingante. Ankoraŭ aliaj akcentas unu el ili, la amon, kiel la signon de la nova naskiĝo kaj vivo laŭ la Spirito. Kiu pravas ?

Ĉu oni povas vivi hodiaŭ spiritan vivon laŭ la modelo prezentita de Jesuo Kristo mem ? Multaj novtestamentaj tekstoj parolas pri tio, ke la volo de Dio direktita al la Eklezio de Kristo en la Nova Interligo ne ŝanĝiĝas. Ĉiuj privilegioj kaj devoj de la unua kristana komunumo estas hodiaŭ la samaj. Nur tiuj, kiuj provas kaŝi sian pekan staton antaŭ Dio kaj antaŭ si mem, ne deziregas la ĉeeston de Dio en sia vivo. Por tiaj homoj sufiĉas aparteni al iu eklezio, viziti preĝejon, eble legi la Biblion, kaj havi bonan opinion pri si mem. La deziregoj de la unua amo de longa tempo forpasis !

Amataj ! Ne parolu pri la Sankta Spirito kaj la spirita vivo, kiel pri io interesa aŭ negrava, superflua aŭ alternativa ! Vivo kaj morto dependas de tio, ĉu ni akceptas la donacon de Dio. Elektu la vivon !

Li vivas kaj volas, ke ni ankaŭ vivu la eternan vivon. Alia vojo ol akcepti la Sanktan Spiriton kaj vivi laŭ li, ne ekzistas.

Unu el la grandaj predikistoj de niaj tempoj Aiden Wilson Tozer, en sia prediko pri pli profunda spirita vivo skribis jene :

> "Laŭ mia konvinko, la rilato inter la Sankta Spirito kaj la kredanto estas la plej grava problemo, antaŭ kiu hodiaŭ staras la Eklezio. Kompare kun ĝi, la problemoj levitaj de la kristana ekzistadismo aŭ ortodokseco estas nenio. Ekumenismaj ideoj aŭ eskatologiaj teorioj ne meritas atenton, ĝis kiam ĉiu kredanto povos jese respondi la demandon : 'Ĉu vi ricevis la Sanktan Spiriton kiam vi ekkredis ?'"

Mi spertis, ke la pli profunda vivo, la vivo laŭ la Spirito, estas la respondo je ĉiuj gravaj demandoj de la hodiaŭaj Eklezio kaj mondo.

Kazimierz Leja, Pollando

Kazimierz LEJA, polo, membro de evangelika eklezio, ŝtatoficisto, edzo kaj patro de du infanoj, esperantisto de post 1978. Li tradukis de A.W. Tozer *Keys to the deeper life* (Ŝlosiloj al la pli profunda vivo) ĝis nun ne publikigita.

# La Puritanoj

RYKEN (Leland). - *Worldly saints : the Puritans as they really were* (Mondumaj sanktuloj : la puritanoj kiel ili efektive estis). - (Usono) : Academie Books - Zondervan, 1986. - 281 p. ; tolbindita.

Se ni juĝas laŭ la popola nivelo de kono, la puritanoj heredigis al ni, la modernuloj, nur unu aĵon (eble du) : la adjektivon puritana. Kvankam ĝi forestas en P.I.V., enestas difino por puritano kiu respondas al ĝi :

> "Persono, kiu afektas striktan severecon en religio aŭ moralo, precipe pri seksaj rilatoj.

Tiu 'afektas striktan severecon' certe ŝokus la originajn puritanojn, se ili vivus hodiaŭ. Tute kontraŭ tio oni devus meti la vivmanieron de la puritanoj de la 16-a kaj 17-a jarcentoj. Tiuj homoj vivi vivojn ĉiamaniere tiel dediĉitajn al Dio, ke hontigus nin la plimulto de la nuntempaj kristanoj.

Tiu ĉi angla-lingva libro bone montras la kredojn, doktrinon, kaj vivmanieron de la puritanoj. La ĉapitroj estas aranĝitaj laŭ ĉef-temoj : laboro, edziĝo, mono, familio, predikado, adorado, Biblio, eduko, kaj socio. Kvankam la aŭtoro havas klaran simpation kun ili, li ankaŭ krome enmetas ĉapitron pri la mankoj de la puritanoj.

La puritanismo estas fervora kaj batalema movado ene de la Eklezio de Anglujo. Ili rigardis la vivon, kiel senĉesan batalon inter la bono kaj la malbono. Robert Sibbes (*robŏt sibs*), eminenta puritano, diris :

> "Estas du grandaj flankoj en la mondo, al kiuj apartenas ĉiu : estas la flanko de Dio kaj de Liaj, kaj estas alia flanko, kiu estas de Satano kaj de liaj : du regnoj, du flankoj, du kontraŭaj naturoj, kiuj postkuras unu la alian."

Ili volis reformitan eklezion, laŭ la maniero de la unuaj kristanoj. Laŭ doktrino ili estis ĉefe kalvinismaj, emfazante, ke la graco estas donaco de Dio. Sed eĉ pli ili substrekis la neceson de persona konvertiĝo al Kristo, kaj la vivon dediĉitan al la Eternulo. La aŭtoro citas John Winthrop (*ĝon ŭinθrop*) -on, kiu unue kondukis la puritanojn al Ameriko. Post lia konvertiĝo, li skribis :

> "Mi estas nun familiariĝinta kun la Sinjoro Jesuo Kristo ; li ofte diradis al mi, kiel li amas min. Mi kredis lin sendube ; se mi foriris, li iris kun mi, kiam mi revenis, li venis hejmen kun mi... kaj tiel dolĉa estis lia amo al

mi, ke mi deziris nenion krom li en la ĉielo aŭ tero."

La puritanoj ne estis unuanimaj pri la regado de la eklezio : kelkaj estis presbiterianaj, aliaj kongregaciismaj, kaj pluraj pretis almenaŭ toleri la regadon de episkopoj. Kelkaj restas ene de la Eklezio de Anglujo (anglikana), aliaj forlasis ĝin. Tio helpas klarigi, kiel ĝi ne transvivis preter la 17-a jarcento kiel unueca grupo.

En Usono almenaŭ estas plua, dua misuzo de la vorto puritana. Oni parolas pri la puritana etiko de laboro (*puritan work ethic*), kiu signifas, ke Dio materie benos tiujn, kiuj pene kaj diligente laboras. Tiu sofismo kombinas veron kun malvero. Dio ordonis, ke la homo laboru kaj ne estu parazito. Sed la motivo estas servi Dion (ĉu per predikado, ĉu per lavado de teleroj), kaj ne amasigi monon por tiu ĉi efemera vivo. La aŭtoro citis Richard Baxter-on (*riĉed bakstr*), alian eminentan puritanon ĉi-konekse :

> "Elektu tiun profesion aŭ metion, en kiu vi plej efike servos Dion. Ne elektu tiun, en kiu vi estos plej riĉa aŭ honorata en la mondo ; sed tiun en kiu vi faros pleje bonon kaj plejbone eskapos pekadon."

Oni povus diri multon pri la puritana sinteno al edziĝo kaj sekso, sed kelkaj linioj sufiĉos. La mezepoka katolika idealo estis fraŭleco, kaj la korpo estas laŭdire esence malbona. Tiun nebiblian koncepton forigis la puritanoj (kaj la reformacianoj ĝenerale), honorigante la edziĝan ligon. La disvastiĝinta ideo de prudaj puritanoj estas falsa. Eĉ nekristanaj scienculoj, kiuj studas ilin, agnoskas tion.

Unu el la plej fortaj kampoj de la puritanoj estis predikado, kaj ili unuanime konsentis, ke tiu estis la plej grava tasko de pastoro. Homoj ofte foriris de anglikanaj preĝejoj kaj venis al la preĝejoj kie predikadis la puritanaj pastoroj. Richard Baxter, mem pastoro, skribis :

> "Estas neniu bagatelaĵo stari fronte al kongregacio, kaj liveri mesaĝon pri savo aŭ damno, kvazaŭ de la vivanta Dio, nome de nia Elaĉetanto. Ne estas bagatelaĵo paroli tiel simple, ke la nesciuloj nin komprenu ; kaj tiel serioze, ke la plej ŝtonaj koroj nin sentu ; kaj tiel konvinke, ke kontraŭdirantoj estu silentigataj."

Alia fortaĵo de la puritanoj estas eduko. Ili ne volis needukitajn pastorojn, kaj strebis instrui al siaj infanoj kiel legi kaj skribi. Alveninte al Nov-Anglujo, ili fondis la alt-lernejon de Harvard. Kiel ekzemplojn de puritanaj scienculoj oni povas mencii

Baxter, Milton, Mather. La puritanoj volis liberalan edukon por la homo, eduko kiu ampleksas ĉiun arton kaj konon krom la studado de la Biblio. Komparu tion kun moderna publika eduko, kiu eĉ ne ekipas la studenton por vivi en tiu tera vivo, ĉar ĝi ne instruas distingi la bonon disde la malbono.

La aŭtoro ne malatentis la mankojn de la puritanoj. Laŭ li, ili estas : nesufiĉa konsidero al distro, tro da reguloj, tro multaj vortoj, tro da pia moral-instuo (*pious moralizing*), vira ŝovinismo, partieco, kaj netoleremo. Tiel, la puritanoj estis persekutataj, sed kiam ili ekregis en Britujo (meze de la 17-a jarcento), ili mem persekutis anglikanojn kaj kvakerojn. Same, nekonformistoj en puritana Nov-Anglujo estis ekzilataj. Sed la aliaj religiaj grupoj de tiu epoko ankaŭ estis netoleremaj. Kaj ĉu okcidenta socio hodiaŭ estas tiel tolerema ? Se kristano ne venigas sian religion en la publikan placon, male lasante ĝin kiel privatan aferon, la socio estas tre tolerema al ni. Sed ho ve, se homo de Dio volas kristanizi la socion !

La libro estas tre zorge dokumentita, kun multaj citaĵoj el la skriboj de la puritanoj. Estas granda bibliografio kaj kolekto de notoj ĉe la fino. Antaŭparolon skribis J. Packer, konata kristana scienculo de la reformita tradicio. Mi varme rekomendas ĝin al tiuj, kiuj volas ekscii, kion vere kredis kaj faris la puritanoj.

Doug Portmann, Usono

ESPERANTISTA LIGO
*en la*
*Ekumeno*

# KELI ★ DIA REGNO

Kristana Esperantista Ligo Internacia
Fondita en 1911

Neneŭtrala ligo, kunlaboranta kun U.E.A.
*Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prez.: A. Burkhardt, Ev. Pfarramt, D-7311 Bissingen/Teck, Fed. Resp. Germanujo.
Sekr.: E. van Dijk-Kuperus, Koningsmantel 4, 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando. Tel. 01720-20222.

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto minimume 25 ned.gld. Membro-subtenanto 37,50 ned.gld. Membro de IKUE 12,50 ned.gld.

Monsendoj al poŝta ĝirkonto n-ro 5506132 de Kristana Esperantista Ligo Internacia KELI, van Hogendorplaan 4, 3135 CF Vlaardingen (Nederlando).

Dia Regno
Oficiala organo de KELI
Fond. 1908

Redaktoro: J. van Keulen, v. Beethovensingel 91A, 3131ED Vlaardingen, Nederlando. Tel. 010-4351198.
Abonprezo, sen membreco en KELI: 21 ned.gld. aŭ egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kaso de KELI, vidu supre.
Ekspedo de Dia Regno, membrolisto de KELI: L. Hordijk, van Hogendorplaan 4, 3135 CD Vlaardingen, Nederlando.

## Esperanto-Misio

Box 7, Östansjö · 694 02 HALLSBERG 2 · Svedujo



## ANTOLOGIETO

*The New compact Bible dictionnary* (La nova konciza biblia vortaro) / ed. T. Alton Bryant. - Minneapolis : BGEA, sd. ((c) Zondervan, 1967). - special crusade edition.

*Life* - Vivo : malsimpla koncepto kun variaj signifonuancoj, redonante diversajn hebreajn kaj grekajn terminojn. Ĝi povas signifi fizikan aŭ naturan vivon, ĉu bestan (Gen 1:20 ; 6:17 ; Apo 8:9), ĉu homan (Lev 17:14 ; Mat 2:20 ; Lk 12:22, ktp). Ĝi estas la vitala principo, aŭ la blovo de fido, kiun Dio donis al la homo, farante lin viva animo (Gen 2:7). Sed la unuaranga afero de la Skriboj estas spirita aŭ eterna vivo por homo. Ĝi estas la donaco de Dio, perita de fido en Jesuo Kristo (Joh 3:16 ; 5:24 ; Rom 5:10 ; 6:23 ; 1 Joh 5:12, ktp). Ĝi ne estas sinonima al senfina ekzistado, kiu estas same vera por la nesavito. Ĝi estas kvalifika, implikanta la enprenon de nova naturo (2 Pet 1:3-4). Ĝi estas komunikita al la kredanto en tiu ĉi vivo, rezultanta en kunuleco kun Dio en Kristo, kaj ne interrompita de fizika morto (1 Tes 5:10). Ĝi trovas sian perfektecon kaj plenan realecon de beno kun Dio en la venonta vivo (Rom 2:7 ; 2 Kor 5:4).

*The Best of A. W. Tozer, 52 favorite chapters* (La plej bona el A. W. Tozer, 52 plej ŝatataj ĉapitroj) / comp. by Warren W. Wierbse. - Harrisburg : Christian Publications, sd. ((c) Baker, 1978). - pp. 112-114.

La koncepto pri spiriteco varias inter diversaj kristanaj grupoj. En iuj rondoj la altvoĉan personon, kiu kontinue parolas pri religio, oni pensas tre spirita ; aliaj akceptas bruan eksteriĝon kiel markon de spiriteco, kaj en iuj eklezioj, la homo kiu unue, plej daŭre kaj plej laŭte preĝas, famiĝas kiel la plej spirita homo en la komunumo.

Nu vigla atestado, oftaj preĝoj kaj laŭta laŭdo povas esti vere konformaj kun spiriteco, sed estas grave ke ni komprenu, ke ili en si mem nek konsistigas ĝin, nek pruvas ĝian ĉeeston.

Vera spiriteco manifestiĝas en kelkaj ĉefaj deziroj. Ĉi tiuj estas ĉiam ĉeestantaj, profunde instalitaj bezonoj sufiĉe potencaj por motivi kaj kontroli la vivon. Por praktikeco mi numeru ilin, kvankam mi ne strebas decidi la ordon de graveco.

1. Unue estas la deziro esti sankta prefere ol ĝoja...

2. Homo povas esti konsiderata spirita kiam li volas vidi antaŭigita la honoron de Dio tra sia vivo, eĉ se tio signifas ke li mem suferos duman malhonoron aŭ perdon...

3. La spirita homo volas porti sian krucon...

4. Denove, kristano estas spirita kiam li vidas ĉion el la vidpunkto de Dio...

5. Alia deziro de spirita homo estas morti ĝusta prefere ol vivi malĝusta...

6. La deziro vidi aliajn antaŭeniri je lia kosto estas alia marko de la spirita homo...

7. La spirita homo kutime faras priĵuĝojn en eterneco anstataŭ priĵuĝojn en tempo...

MONOD (Adolphe). - *Les Adieux* (La adiaŭoj). - Vevey : Groupes Missionnaires, 1968. - pp. 131-132.

Oni perfekte komprenos mian penson pri la maniero kiel mi volus reguligi mian vivon, se oni konsideras la manieron kiel Jesuo reguligis la sian. Ni ne trovas ĉe Jesuo tiujn planojn, tiujn metodojn, kiuj tiom okupis multajn bonulojn, kaj kiuj ofte tiom turmentis ilin, kaj kiuj prenis de ili konsiderindan tempon, kiun ili povus pli bone uzi. Sed kion ni trovas ? Ni trovas homon (mi konsideras lin ĉi tie kiel Filon de la homo), kiu proponas nenion krom plenumi la mision, kiun li ricevis de la Patro, kaj kiu havas neniun planon krom eniri en la planon de la Patro ; tiel ke, la okuloj fiksitaj sur la Patro, li zorgas nur pri aŭskultado de Lia voĉo por ĝin sekvi, kaj pri ekkono de Lia volo por ĝin plenumi. La bonaj faroj de Jesuo Kristo estos ĉiuj donitaj unu post la alia, ĉiuj metitaj se la mano de Dio antaŭ li sur lia vojo, kaj sekvas unu la alian tiel nature, naskiĝas tiel facile unu el la aliaj, ke ili neniam interplektiĝas, eĉ en la plej okupataj tagoj de lia servado.

SCHAEFFER (Francis). - *True spirituality* (Vera spiriteco). - Bromley, England : STL, 1979. - p. 87.

La realeco de la vivo per fido kvazaŭ ni jam estas mortintaj, de la vivo per fido en malfermita kunuleco kun Dio, kaj tiam repaŝante en la eksteran mondon kvazaŭ ni estas jam releviĝintaj el la mortintoj, tio ne estas unufoje por ĉiam, ĝi temas pri moment-post-momenta fido, kaj moment-post-momenta vivo. La ĉimatena fido neniam utilos por ĉi tiu tagmezo. La ĉitagmeza fido neniam utilos por la vespero. La fido de la vespero neniam utilos por la momento enlitiĝi. La fido de noktomezo neniam utilos por la venonta mateno. Dankon al Dio por la realeco, por kiu ni estis kreitaj, moment-post-momenta





kunuleco kun Dio mem. Certe ni devus esti dankaj, ĉar la moment-post-momenta kvalito almetas la tuton al nia grandeco, kiel Dio faris nin.

LEWIS (C. S.). - *Mere Christianity* (Nura kristaneco). - Glasgow : Collins, 1982. -(Fount Paperbacks). - p. 189.
& franca traduko : *Voilà pourquoi je suis chrétien* (Jen kial mi estas kristano). - Guebwiller : L.L.B., 1979. - p. 226.

Tiu ĉi principo validas tra la tuta vivo, de komenco ĝis fino. Fordonu vin mem, kaj vi trovos vian realan memon. Perdu vian vivon kaj vi savos ĝin. Submetiĝu al la morto, morto de viaj ambicioj kaj preferataj deziroj ĉiutage kaj morto de via tuta korpo fine : submetiĝu kun ĉiu fibro de via estaĵo, kaj vi trovos la eternan vivon. Konservu nenion. Nenio, kion vi ne forlasis, estos reale via. Nenio en vi, kio ne mortis, releviĝos iam el la morto. Serĉu vin mem, kaj vi trovos finfine nur malamon, solecon, malesperon, furiozon, ruinon kaj kadukiĝon. Sed serĉu Kriston, kaj vi trovos lin, kaj kun li ĉion ceteran estos aldonita.

VERNIER (Philippe). - *Avec le Maître, Brèves méditations, Troisième série* (Kun la Majstro, Mallongaj meditoj, Tria serio). - Bruxelles : Librairie Evangélique, sd. - p. 31-32.

La apostolo Paŭlo konfesas nete : li ne atingis la perfektecon ! Certe la Majstro regas lian vivon ; per li, li sentas sin "libera", "lavita", "sanktigita", sed dum li restas en sia korpo, li daŭre konscias pri rezistado, kiu apartigas ankoraŭ lin disde Dio. Lia koro eniris la eternan vivon, sed ŝajnas al li, ke la cetero de lia korpo penas sekvi, ke li estas ankoraŭ tre malproksima de la perfekta konstanta unuiĝo kun la Majstro...

La ekzemplo de la apostolo montras al vi, ke la tensio neniam devas ĉesi inter via fido kaj via homa naturo, inter la beniga certeco aparteni al Dio kaj la angoriga konstato pri via persista maldigneco. Necesas al vi samtempe, senti vin mem pardonita kaj daŭre pardonpeti, scii esti konvertita kaj diri "Savu min !"


Konvertiĝi estas ŝanĝi vojon, kaj sin turni al la vera celo ; sed eĉ pli necesas antaŭeniri sur ĉi tiu nova vojo, ne devojiĝi, ne sidiĝi dumvoje... Necesas esti trovata "viglanta", t.e. "strebanta al la perfekteco."

# Eldonejo Sivron

P.O.K. 23 180, IL-91 251 Jerusalem, Israel.

...kaj ricevu 37%-an rabaton de la subaj prezoj.

Ŝanĝopunkto, La, Jeremi Gishron. Jerusalemo: Eldonejo Sivron, 1987. 38p. 14cm. Mimeo. Broŝ. Pensoj pri la koncepto de mondinterŝanĝo. Prezo: 9,90 gld.





Ortodoksa esperantismo: La lukto por unueco, Erco Baraka. Jerusalemo: Eld. Sivron, 1985. 9p. Mimeo. 15cm. Eseo pri la ... de la esperantismo dum la fruaj jaroj; kun notoj kaj ... Prezo: 4,20 gld.

Zamenhof and Esperanto, Norman Berdichevsky. Jerusalemo: Sivron, 1986. 10p. 15cm. Prezo: 4,20 gld.

Historio de la Esperanto-movado en Israelo (represo el Israela Esperantisto, 1982), A. Wandel (1954). Jerusalemo: Sivron, 1986. 8p. 15cm. Prezo: 2,10 gld.

Lingvo kaj religio; Studo pri la frua esperantismo kun speciala atento al L.L. Zamenhof, Jeremi Gishron (1948). Jerusalem: Sivron, 1986. 212p. 14cm. Prezo: 36,00 gld.

Unuopaj poemoj (Kantoj):
Jerusalemaj Kantoj 0.50 gld
L'Alf-Beta Kanto 0.50 gld
La Paca Poeto 0.50 gld




Urba oazo, D. Mager (1954) kaj J. Gishron (1948). Jerusalemo: Sivron, 1986. 10p. Ilus. 15cm. Originalaj poemoj. Prezo: 4,80 gld.

Mia kara moŝto!; Amikaj poemoj, Erco Baraka. Jerusalemo: Eld. Sivron, 1986. 12p. Ilus. 15cm. Originalaj poemoj. Prezo: 4,80 gld.

Eli kaj Jahu; Poemoj el la Sankta Lando, Erco Baraka kaj David Mager. Jerusalemo: Eld. Sivron, 1986. 15p. Mimeo. ... Originalaj poemoj, plejparte ... al Esperanto ...

Kosma amo, Josef Kohen-Cedek (1903). Originalaj poemoj. Jerusalemo: Sivron, 1986. 14p. Ilus. 15cm. Prezo: 6,30 gld.

## KRISTANAJ RENDEVUOJ

BIBLIA SABATO-DIMANĈO
27-29-an de majo 1988
*K.C.E., La Chaux de F. Svislando*

K.C.E.
BP 779
CH-2301 La Chaux de F.
Svislando




38-a KONGRESO DE KELI
11-18-an de julio 1988
*Jyväskylä, Finnlando*





Marjatta Linjama
Hietatie 1
SF-40530 Jyväskylä
FINNLANDO

2-a KRISTANA ESPERANTISTA KULTURSEMAJNO
10-15-an de okt. 1988
*K.C.E., La Chaux de F. Svislando*



BIBLIA SABATO-DIMANĈO
14-16-an de okt. 1988
*K.C.E., La Chaux de F. Svislando*



7-a KRISTANA EKUMENA KONGRESO
22-29-an de julio 1989
*Uckfield, Britujo*

David Featherstone
121 Limpsfield Rd
South Croydon, Surrey
Britujo, SS6 8QW

*en la kvara numero*

KOMUNIKADO

Ekzegezo - Kiel kompreni ? (G. Berveling)

La Biblio - skriba komunikaĵo de Dio (D. Featherstone)

La lingvo de fotografio (H.R. Schmidt)

Jesuo kiel modela komunikanto (D. Portmann)

1 Kor 14:11 (J.F. Twilley)

Kiel komuniki filozofion ? (E. Pauli)

La poeta lingvo - bildoj, vortoj (Bessenyei T.)

Percepti la aŭskultantaron (B. Cadei)

La lingvo de la katedraloj (O. Kantele)

Dio uzis homan lingvon (Zhao Zhilian)

Lingva influo de religio en Esperanto (G. Silfer)

Du internideaj lingvoj, la novhebrea kaj Esperanto (J. Gishron)



LEMAIRE (Jacques). - *Preĝo, spiro de la spirita vivo.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 3, 1988, pp. 3-8.

NOVA NASKIĜO estas la komenco de la SPIRITA VIVO. La PREĜO estas al DIO en la SANKTA SPIRITO. Oni povas preĝi per LINGVEPAROLO kaj per intelekto.

---

ROTTHAUS (Theotima). - *La Psalmoj, nutraĵo de la spirita vivo.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 3, 1988, pp. 9-14.

La PSALMOJ estis, estas ofte uzataj kiel PREĜOTEKSTOJ. Oni uzis, uzas ilin en LITURGIO. Kiel ili povas fariĝi SPIRITA NUTRAĴO ?

---

Tiuj ĉi paĝoj estas modeloj por reprodukti katalog-slipojn. Sur ĉiu estas indeksa resumo, kun la ŝlosil-vortoj (deskriptoroj) majuskle indikitaj. Malantaŭ ĉiu estas la tradukoj de tiu ĉi resumo.

La NOUVELLE NAISSANCE est le commencement de la VIE SPIRITUELLE. La PRIERE est dirigée vers DIEU par le SAINT-ESPRIT. On peut prier avec le PARLER EN LANGUES ou avec l'intelligence.

Die WIEDERGEBURT ist der Anfang des GEISTLICHEn LEBENs. Das GEBET richtet sich an GOTT im HEILIGEN GEIST. Man kann beten durch die ZUNGENREDE und mit dem Verstand.

La NUOVA NASCITA è l'inizio della VITA SPIRITUALLE. La PREGHIERA è rivolta a DIO nello SPIRITO SANTO. Si può pregare con la lingua (PARLARE IN LINGUE) e con la mente.

NEW BIRTH is the start of the SPIRITUAL LIFE. The PRAYER is unto GOD by the HOLY SPIRIT. It is possible to pray using (SPEAKING IN) TONGUES and the intellect.

NUEVO NACIMIENTO es el comienzo de la VIDA ESPIRITUAL. La ORACIÓN se hace a DIOS en el ESPÍRITU SANTO. Se puede orar en (HABLA EN) LENGUAS y por el entendimiento.

Les PSAUMES étaient, sont souvent utilisés comme TEXTES DE PRIERE. On les a utilisés, on les utilise dans la LITURGIE. Comment peuvent-ils devenir NOURRITURE SPIRITUELLE ?

Die PSALMEN wurden und werden oft als GEBETSTEXTE verwendet. Man verwendete und verwendet sie in der LITURGIE. Wie können sie zur GEISTLICHEn NAHRUNG werden ?

I SALMI spesso furono e sono usati come TESTI DI PREGHIERA. Sono stati e sono tuttora usati nella LITURGIA. Come possono diventare NUTRIMENTO SPIRITUALE ?

The PSALMS have been, are often used as PRAYERs (TEXTS). They have been, are used in LITURGY. How can they become SPIRITUAL FOOD ?

Los SALMOS fueron utilizados, se utilizan frequentamente como TEXTOS DE ORACIÓN. Fueron, son utilizados en la LITURGIA. ¿Cómo pueden convertirse en ALIMENTO ESPIRITUAL ?

HORÅK (Cyril). - *Spirite vivi en materialisma etoso.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 3, 1988, pp. 15-25.

La SPIRITA VIVO estas KUNULECO kun DIO, direktita al Li. La MATERIALISMO prezentas bonajn aŭ malbonajn aspektojn. Spirite vivi implicas KONFLIKTOn kun la SOCIA MEDIO.

LAMB (David). - *Spirita vivo ĉe mensaj handikapuloj.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 3, 1988, pp. 27-30.

Kio estas MENSA HANDIKAPULO ? Kiel manifestiĝas ĉe ili la SPIRITA VIVO ? Kiel al ili fari EVANGELIZOn ?

La VIE SPIRITUELLE est COMMUNION avec DIEU, dirigée vers Lui. Le MATERIALISME présente des bons et des mauvais aspects. Vivre spirituellement implique un CONFLIT avec le MILIEU SOCIAL.

GEISTLICHES LEBEN ist GEMEINSCHAFT mit GOTT und richtet sich auf ihn aus. Der MATERIALISMUS hat gute und schlechte Seiten. Geistlich leben bringt immer auch in KONFLIKT mit dem GESELLSCHAFTLICHEn UMFELD.

La VITA SPIRITUALE è COMUNIONE con DIO, orientata verso di Lui. Il MATERIALISMO presenta aspetti buoni e cattivi. Vivere spiritualmente implica lo SCONTRO con l'AMBIENTE SOCIALE.

The SPIRITUAL LIFE is COMMUNION with GOD, for God. MATERIALISM has good and bad aspects. To live in the Spirit implies CONFLICT with the SOCIAL SURROUNDINGS.

La VIDA ESPIRITUAL es COMUNIÓN con DIOS, dirigida al Él. El MATERIALISMO presenta buenos o malos aspectos. Vivir espiritualmente implica CONFLICTO con el MEDIO SOCIAL.

Qu'est-ce qu'un HANDICAPE MENTAL ? Comment se manifeste pour eux la VIE SPIRITUELLE ? Comment leur faire de l'EVANGELISATION ?

Was ist ein GEISTIG BEHINDERTER ? Wie könnte sich bei ihm GEISTLICHES LEBEN äußern ? Wie erreicht ihn die FROHBOTSCHAFT ?

Chi è l'HANDICAPPATO MENTALE ? Come potrebbe manifestarsi la VITA SPIRITUALE in lui ? Come è possibile la sua EVANGELIZZAZIONE ?

What is a MENTALLY HANDICAPPED person ? How should they show their SPIRITUAL LIFE ? How should we tell them the Gospel (EVANGELIZATION) ?

¿Qué es un DISMINUITO MENTAL ? ¿Cómo se manifestaría en ellos la VIDA ESPIRITUAL ? ¿Cómo hacerles llegar la EVANGELIZACIÓN ?

NEIL (Thomas). - *Eric Liddell, spirita kaj muskola vivo.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 3, 1988, pp. 31-39.

De SPORTISTO al MISIISTO en ĈINIO, la vivo de LIDDELL (ERIC).

PLATZER (Heinz). - *Familia spirita vivo.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 3, 1988, pp. 41-52.

La aŭtoro rakontas sian FAMILIAn VIVOn.

De SPORTIF à MISSIONNAIRE en CHINE, la vie de LIDDELL (ERIC).

Vom SPORTLER zum MISSIONAR in CHINA, das Leben von LIDDELL (ERIC).

Da ATLETA SPORTIVO a MISSIONARIO in CINA, vita di LIDDELL (ERIC).

From SPORTSMAN to MISSIONARY in CHINA, the life of LIDDELL (ERIC).

De DEPORTISTA a MISIONERO en CHINA, la vida de LIDDELL (ERIC).

L'auteur raconte sa VIE FAMILIALE.

Der Autor berichtet aus seinem FAMILIENLEBEN.

L'autore racconta la propria VITA FAMILIARE.

The author relates his FAMILY LIFE.

El autor cuenta su VIDA FAMILIAR.

BOURDON (Louis). - *La religia vivo de la Fratoj Predikistoj.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 3, 1988, pp. 53-56.

Kio estas la DOMINIKANOJ ?

Sur via adres-etikedo troviĝas du numeroj. La unua estas la numero de via adreso en mia sliparo, kaj la dua, interkrampa, estas la lasta numero, kiun vi ricevos sen plia abon-pago aŭ sen nesciata baldaŭa verkado por la revuo.

Que sont les DOMINICAINS ?

Was sind die DOMINIKANER ?

Chi sono i DOMENICANI ?

What are the DOMINICANS ?

¿Qué son los DOMINICOS ?

**ABONOJ**

Abono por du numeroj, t.e. unu jaro : 70 FRF.
(vi nepre indiku ekde kiu numero).

al *Philippe Cousson, Le Hameau des Plaids, Nouaillé-Maupertuis, 86340 La Villedieu du Clain, Francujo.*
per poŝta konto, Philippe Cousson, 244 45 X, Limoges, Francujo,
aŭ per internacia poŝta mandato en FRF,
aŭ per 16 internaciaj respondkuponoj.

aŭ al <u>Aŭstrujo</u> *Heinz Platzer, Brünnerstr. 107-109/2/1, 1210 Wien*
ÖPSK-konto 3675.724, Heinz Platzer
<u>Belgujo</u> *Jacques Lemaire, rue des déportés 100, 6180 Courcelles*
konto 001-0405933-64
<u>Britujo</u> *Thomas Neil, 82 Glasgow Rd, Kilmarnock, KA3 1UN*
national giro, FEBC, 65274 0006
<u>Irlando</u> *Maire Mullarney, Mill H., Whitechurch Rd, Rathfarnham, Dublin 14*
<u>Israelo</u> *Esperanto Centro, P.O. Box 23 180, 91231 Jerusalem*
<u>Italio</u> *Centra Oficejo de IKUE, via F. Berni 9, 00185 Roma*
CCP Centra Oficejo de IKUE, 23290000
<u>Nederlando</u> *Leen Hordijk, v. Hogendorplaan 4, 3135 CD Vlaardingen*
post giro, KELI, 5506132
<u>Svedujo</u> *Gustav Stenholm, Domprostgatan 18 B, 532 31 Skara*
poŝtĝirkonto, Kristliga Esperantoförbundet, 9 14 39-0
<u>Svislando</u> *Lina Reutemann, Iddastr. 34, 9008 St Gallen*
poŝta ĉekkonto, KELI svisa sekcio (Z en), 80-52203-8, Zürich
<u>Usono</u> *Edwin C. Harler Jr, 47 Hardy Rd, Levittown Pa 19056*

aŭ al UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, pere de la konto phco-m.
(vidu en la jarlibro 1987, ĉe la paĝo 41)

Ni daŭre serĉas perantojn en aliaj landoj.

Vi kompreneble povas donace aboni iun alian, kiu cetere havus problemon por sin aboni.

## ARTIKOLOJ

Jacques LEMAIRE : Preĝo, spiro de la spirita vivo 3

Theotima ROTTHAUS : La Psalmoj, nutraĵo de la spirita vivo 9

Cyril HORÁK : Spirite vivi en materialisma etoso 15

David LAMB : Spirita vivo ĉe mensaj handikapuloj 27

Thomas NEIL : Eric Liddell, muskola kaj spirita vivo 31

Heinz PLATZER : Familia spirita vivo 41

Louis BOURDON : La religia vivo de la Fratoj Predikistoj 53

## KONTRIBUAĴOJ

Kazimierz LEJA : La Sankta Spirito kaj la spirita vivo 57

## RECENZOJ

Doug PORTMANN : RYKEN : Worldly saints, the Puritans as they really were 59

ANTOLOGIETO 63

prezo : 35 FRF